
(EN ESPERANTO)

ISSN 0032-4361 11 1993

中国报道

# EL POPOLA ĈINIO





Kaverno sur maro    Foto de **DA WEI**

## INTER NI

### Pri la fonetika alfabeto de la ĉina lingvo

Mi ŝatus, ke la revuo enhavu ĉinlingvan artikolon kun ĝia Esperanta traduko cele plibonigi mian scion de la ĉina lingvo, kiun mi studas sola.

**PIERRE BERLOT**
(Francio)

Mi eksciis, ke nun ekzistas ebleco skribi la ĉinan lingvon per la latinaj literoj. Mi ŝatus legi sufiĉan kompletan artikolon pri tiu rimedo... Ĉu tiu nova skribmaniero estas jam instruata en la ĉinaj lernejoj?

**PIERRE GUEROUT**
(Francio)

*La ideogramoj de la ĉina lingvo estas kvadrataj kaj la ofte uzataj ideogramoj estas ĉirkaŭ 6 000. La ĉina lingvo estas relative malfacila en la prononcado.*

*La fonetika alfabeto multe faciligas lernadon de la ĉina lingvo. Ellerninte la fonetikan alfabeton el 21 konsonantoj, 34 vokaloj kaj 4 tonturnoj, oni povas pli facile prononci la ĉinajn ideogramojn. Ni ekzemplu per ideogramo* 天 *(tian, en signifo de ĉielo). Ĝia konsonanto estas T, ĝia vokalo estas IAN, kaj oni prononcu kiel tian. La fonetika alfabeto estas unu el la devigaj kursoj por elementlernejanoj. Legante la literojn apud ĉiu ideogramo, la lernantoj de la 4-a klaso de elementa lernejo povas tuj prononci la ideogramojn en vortaro.*

*La ortografia alfabeto de la ĉina lingvo konsistas el latinaj literoj, tamen la prononcado estas iom malsama ol tiu de la latinaj literoj. Ni estas dankaj, ke niaj legantoj interesiĝas pri la ĉina lingvo. Ni konsilas, ke vi unue ellernu la fonetikan alfabeton. Laŭ peto de legantoj ni donas ekzemplon en ambaŭ lingvoj kaj ankaŭ la literumadon.*

*La pekina aŭtuno estas tre bela,*
北京的秋天是美丽的，
*(Beijingde qiutian shi meilide)*
*Ne estas vento, nek pluvo,*
没有风，没有雨；
*(Meiyou feng, meiyou yu)*
*La lazura ĉielo estas sennuba.*
蓝蓝的天空不挂丝云。
*(Lanlande tiankong bugua si yun)*

**La Red.**

MONATA GAZETO ELDONATA DE ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. KESTO 77. BEIJING. ĈINIO

# ENHAVO


2 *INTER NI*

4 Ĉinio restas disvolviĝanta lando

6 Harbin, fenestro de norda Ĉinio

8 *HISTORIA MISTERO:*
Perdita nacio retrovita

10 La Pekina Universitato en reformado

13 *ITINERO PROPONITA:*
12-taga itinero Pekino — Nankino — Huangshan-monto — Hangzhou

14 Pilgrimo, legendo, pentraĵo

15 Selenoriĉa regno

16 *SUR NIA LIBROBRETO:*
Esperanto — iam danĝera lingvo

17 *POR KOMENCANTOJ:*
Memriproĉo

18 Naŭdrakaj ekranmuroj en Ĉinio

20 Kleriga kongreso en suna urbo

24 *ESP-NOVAĴOJ*

25 *SUR STRATOJ:*
La akvoriĉa urbo Shaoxing

28 *VERDIGO EN ĈINIO:*
Verdaj marbordoj

32 Pri operoj de Ĉinio

36 *EL ĈINAJ GAZETOJ*

37 Miraklo de amo

39 Furoras sanigaj ekzercoj

40 *POR VIA SANO:*
Simplaj sanprotektaj metodoj

41 Historiaj ŝanĝoj en Tibeto

42 *AMUZOJ*

46 Vidaĵoj en antaŭurbo de Ŝanhajo

48 *KURANTAJ AFEROJ*

50 *METIARTAĴOJ:*
Koloraj ovoj en Ĉinio

*SUR LA KOVRILO:*
Knabino antaŭ ruĝa pordo
Foto de **Da Wei**

2 Kaverno sur maro


34 La Antikva Scenejo en Tianjin

43 Kvadrata korto en Pekino

*SUR LA DORSKOVRILO:*
La akvofalo Hukou sur la Flava Rivero


## LOKOJ MENCIITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Tibeta Aŭtonoma Regiono (p. 41)
2. Harbin (p. 6)
3. Jianshi-gubernio (p. 15)
4. Huangshan-monto (p. 13)



KE JI:

# Ĉinio restas disvolviĝanta lando

ANTAŬ nelonge komunikiloj de Okcidento diris, ke la ĝenerala skalo de la ĉina ekonomio okupas la trian lokon en la mondo, nur post tiuj de Usono kaj Japanio, citante el la referaĵo publikigita de la Monda Banko kaj la Internacia Mona Fondaĵo. La kalkulo montras, ke la skalo estas trioble pli granda ol tiu en 1989.

Kiom forta estas Ĉinio? Ĉu ĝi estas ekonomia superpotenco? Por respondi la demandojn ni legu materialojn el la "Raporto pri la Disvolviĝo de Ĉinio en 1992" farita lastatempe de la Ŝtata Statistika Buroo de Ĉinio. Per la raporto oni unuafoje informis pri la detalo de la sinteza nacia forto de Ĉinio.

## LA TRIA LOKO EN LA MONDO KADRE DE RAPIDECO DE EKONOMIA DISVOLVIĜO

Post sia fondiĝo en 1949 la nova Ĉinio uzis tri jarojn por restarigi sian ekonomion. En 1953 ĝi komencis la Unuan Kvinjaran Planon (1953-57) por nacia ekonomio kaj socia disvolvo. En tiu periodo la ĉina ekonomio disvolviĝis rapide kaj akordiĝe kaj la nacia enspezo pliiĝis meznombre je 12.2% ĉiujare; en la 60- kaj 70-aj jaroj la ĉina ekonomio malrapide disvolviĝis pro mispaŝo de politiko (en la 60-aj jaroj ĝi pliiĝis meznombre je 4% ĉiujare kaj en la 70-aj — je 5.8%); en la 80-aj jaroj ekpraktikiĝis la politiko de reformado kaj pordmalfermo, kaj en 1980-1989 la jara kresko de la totala valoro de la nacia produktado atingis 9.2%, dum tiuj de la evoluintaj kaj disvolviĝantaj landoj estis 2.7% kaj 3.1% respektive. En la 90-aj jaroj la ĉina ekonomio estas en forta tendenco de altrapida kresko, kio draste kontrastas kun la nerapida disvolviĝo de la monda ekonomio.

De 1953 ĝis 1990 la jara kresko de la totala valoro de la nacia produktado de Ĉinio estis 7%, nur post tiuj de Singapuro kaj la Korea Respubliko, kies ekonomio disvolviĝis plej rapide en la mondo.

## LA ĜENERALA SKALO DE EKONOMIA FORTO EN KRESKADO

La disvolviĝo de ekonomio akcelas la kreskon de nacia forto. En 1990 la nacia enspezo de Ĉinio estis 12-oble pli granda ol tiu en 1952. La "Raporto pri la Disvolviĝo de la Mondo en 1991" publikigita de la Monda Banko montris, ke la totala produktovaloro de Ĉinio en 1989 okupis la naŭan lokon en la mondo.

La lokoj de la totala produktokvanto de la industrioj kaj agrikulturo de Ĉinio en la mondo multe antaŭiĝis. Ekz., en 1950 Ĉinio produktis 610 000 tunojn da ŝtalo kaj per tio ĝi okupis la 26-an lokon en la mondo. En 1991 ĝi produktis 70.57 milionojn da tunoj da ŝtalo kaj okupis la kvaran lokon en la mondo. Samjare, la elektroprodukto okupis la kvaran lokon en la mondo (antaŭe la 25-an lokon); la produktokvanto de greno okupis la unuan lokon (antaŭe la duan lokon); kaj la kvanto de transportata varo okupis la trian lokon (antaŭe la sepan lokon). En 1990 ĉiu cento da ĉinoj posedis po 1.1 telefonojn, eĉ post la Korea Respubliko, Tajlando, Egiptio, Brazilo kaj aliaj disvolviĝantaj landoj.

Tiuj ĉi faktoj montras, ke la bazaj industrioj de Ĉinio, kiel tiuj de nafto, elektroprodukto, trafiko kaj telekomuniko, ankoraŭ estas en subdisvolviĝo, multe post evoluintaj landoj.

En 1991 la valoro de importitaj kaj eksportitaj varoj de Ĉinio estis 135.7 miliardoj da usonaj dolaroj, 119-oble pli multe ol tiu en 1950. Ĝi okupis la 12-an lokon en la mondo. Kvankam la importa kaj eksporta komerco de Ĉinio rapide disvolviĝis, tamen la totala komerco okupis kompare malaltan lokon en la mondo.

## MALALTA POKAPA VALORO DE LA NACIA PRODUKTADO

Antaŭe alilandanoj opiniis, ke Ĉinio estas malriĉa, kaj nun ili diris, ke Ĉinio estas riĉa. Ĉu la ĉinoj vere riĉiĝis?

En 1991 la totala valoro de nacia produktado de Ĉinio atingis 1 985.5 miliardojn da juanoj kaj la pokapa sumo 1 725 juanojn; la totala financa enspezo de Ĉinio estis 361.09 miliardoj da juanoj, la pokapa enspezo de la urbanoj — 1 544 juanoj kaj la neta pokapa enspezo de kamparanoj 709 juanoj. Kompare kun tiu en 1978, la pokapa totala valoro de nacia produktado de Ĉinio pliiĝis je 7.2% ĉiujare, multe superis 1.2% de la mondo kaj duobliĝis kompare kun tiu antaŭ dek jaroj.

Tamen, estas konate, ke en la pasintaj 40 jaroj duobliĝis ankaŭ la loĝantaro de Ĉinio. La "Raporto pri la Disvolviĝo de la Mondo en 1990" diris, ke la pokapa nacia produktovaloro de Ĉinio estis 370 usonaj dolaroj kaj okupis la 96-an lokon en la mondo.

Tiujare, la pokapa nacia produktovaloro de la mondo atingis 4 200 usonajn dolarojn. En tiu ĉi jaro la pokapa enspezo de la landoj kun malalta enspezo estis 350 usonaj dolaroj.

En 1990 ĉiu ĉino posedis meznombre 945 kg da karbo, kiuj superis la meznombran kvanton de la loĝantoj de la mondo; la meznombra kvanto de kotono kaj kolzosemo posedata de ĉinoj egalis al tiu de la mondo; kaj la meznombra kvanto de greno posedata de ĉinoj proksimiĝis al tiu de la mondo. La pokapa posedkvanto de cemento, ŝtalo, nafto, elektro, viando de porko, bovo kaj ŝafo estis malpli granda ol tiu de la mondo.

La granda produktokvanto kaj la malgranda pokapa kvanto karakterizas la ĉinan ekonomion. La karakterizaĵo restos senŝanĝa en longa tempo. La kaŭzo kuŝas en tio, ke la ĉina loĝantaro estas granda, sekve ankaŭ la naskokvanto estas granda.

## ĴUSA SOLVO DE PROBLEMO DE MINIMUMA VIVTENADO

Rilate al konsumado de manĝaĵoj de ĉinoj, en 1990 la pokapa konsumkvanto de greno estis 238.8 kg, dum tiu de la disvolviĝantaj landoj — 204.2 kg; la pokapa konsumkvanto de kokovoj estis 6.3 kg, egale al tiu de la mondo; la pokapa konsumkvanto de viando estis 20.1 kg, je 40% malpli multe ol tiu de la mondo; la pokapa konsumkvanto de akvoproduktaĵoj estis 6.5 kg, egale al duono de tiu de la mondo; kaj la pokapa konsumkvanto de bovinlakto estis 4.7 kg, egale al 6% de tiu de la mondo.

Laŭ la kalkulo de la Grena kaj Agrikultura Programo de UN, en 1987-1989 ĉiu ĉino meznombre enprenis tage 2 634 grandajn kaloriojn, dum ĉiu loĝanto de la disvolviĝantaj landoj meznombre enprenis tage 2 474 grandajn kaloriojn; 62.8 gramojn da proteino, je 2.9 gramoj pli multe ol tiom en la disvolviĝantaj landoj; kaj 45.5 gramojn da graso, je 2.1 gramoj malpli multe ol tiom en la disvolviĝantaj landoj.

Ĉio supre dirita montras, ke ĉinoj enprenas malpli da animalaj manĝaĵoj kaj pli da vegetalaj.

El la strukturo de konsumaĵoj de la ĉinoj videblas, ke laŭ elspezo pro manĝaĵo Engel-koeficiento estas 54.5%. Se oni juĝas mizerecon kaj riĉecon laŭ Engel-koeficiento observata de la Grena kaj Agrikultura Programo de UN, Ĉinio estas inter la absoluta mizero (Engel-koeficiento superas 59%) kaj mezhavo (Engel-koeficiento troviĝas inter 40-50%).

Rilate la loĝdomojn, en 1990 ĉiu urbano havis 6.7 kvadratajn metrojn, dum kamparano 17.8 kvadratajn metrojn, egale al meznombra areo de la mondo tiuflanke. Sed oni devas rimarkigi, ke iuj loĝdomoj ne estis ekipitaj per instalaĵoj por akvo, gaso, kuirejo kaj necesejo. Tio montras, ke kondiĉoj de loĝado de ĉinoj estas sub la meza nivelo. Vestado estas rigardata kiel baza enhavo de la kvalito de la vivo. En 1991 la pokapa konsumita ŝtofo estis 10.6 m. Oni povas diri, ke la problemo pri vestado de 1.1 miliardoj da loĝantoj estas solvita.

Pro longtempa neglekto de la terciara industrio, multaj malfacilaĵoj ekzistas en la vivo de ĉinoj, ekzemple neglata trafiko, nesufiĉeco de infanĝardenoj kaj hospitaloj.

Ekonomiaj disvolviĝoj en diversaj lokoj ne estas egalaj. En Ĉinio pli ol 520 gubernioj estas subvenciataj de la ŝtato. En la tuta lando almenaŭ 80 milionoj da loĝantoj bezonas solvi la problemon de minimuma vivtenado, ke ilia jara meznombra enspezo ankoraŭ restas malpli ol 300 juanoj.

## KOMPARE MALALTAJ EDUKITECO KAJ KVALITO DE HOMOJ

Edukado markas nivelon de disvolviĝo de la socio. La nuna edukado de Ĉinio statas: En 1991 elementa ekukado ĝeneraliĝis en 76% de la gubernioj de Ĉinio. En 1991 kaj 1992 en la lando kvin milionoj da lernoaĝaj infanoj ne vizitis lernejon aŭ ĉesigis sian lernadon; en 1988 44% de la elementlernejanoj iris en mezlernejon, egale al la disvolviĝantaj landoj, dum la averaĝaj pocentoj de la mondo estis 52.1%. En 1990 Ĉinio havis 2.063 milionojn da studentoj kaj per tio okupis la kvinan lokon en la mondo. En 1988 nur 1.8% de la abiturientoj de Ĉinio vizitis altlernejon, dum en la disvolviĝantaj landoj 8.3% de la abiturientoj havis la ŝancon.

La lasta censo montris, ke Ĉinio havas 180 milionojn da analfabetoj kaj duonanalfabetoj en la aĝo de pli ol 15 jaroj. Inter ili 46 milionoj da analfabetoj havas la aĝon de 15-39 jaroj. Premise de neapero de novaj analfabetoj, oni bezonos 10 jarojn por klerigi la 46 milionojn da analfabetoj. Laŭ statistiko, en 1990 la meznombra tempo por ĉiu edukito estis 6 jaroj kaj la kultura strukturo estis tipo de la disvolviĝantaj landoj kun malaltgrada nivelo de klereco. En tiu flanko Ĉinio restas malproksima de la monda nivelo.

## MALALTA LA ĜENERALA NIVELO DE RIĈFONTOJ DE HIGIENA SERVO

En la higiena afero de Ĉinio la tradicia ĉina medicino kombiniĝas kun la okcidenta medicino, preventado kombiniĝas kun kuracado kaj perfektiĝas la sistemo de sanitara servo por la urboj kaj kamparo. En 1991 Ĉinio havis 209 000 higienajn servojn, 2.689 milionojn da malsanulaj litoj (2.4 litoj por ĉiu milo da personoj) kaj 4 milionojn da kuracistoj kaj flegistoj (nur 1.1 kuracistoj por ĉiu milo da personoj). En la lastaj jaroj pligrandiĝis la diferenco inter la higienaj servoj en la urboj kaj kamparo kaj la sanstato de la kamparanoj estas malpli bona ol tiu de la urbanoj.

Mortokvanto de beboj estas kriterio de la internacia socio por mezuri la socian civilizacion de lando. La mortokvanto de beboj de Ĉinio estas 3%, pli malalta ol tiu de la landoj kun supermeza enspezo. Tio markas, ke Ĉinio multe progresis en tiu flanko. La alia kriterio estas meznombra vivdaŭro de la loĝantoj. La meznombra vivdaŭro de ĉinoj estas 70 jaroj, dum tiu de la landoj kun supermeza enspezo estas 67 jaroj.

# Harbin, fenestro de

ĈE la enirejo de la Ekonomia-Komerca Foiro en Harbin okulfrapis la emblemo de la foiro: Du ventumil-formaj ornamaĵoj ĉirkaŭas belan cignon (surmape la provinco Heilongjiang (Hejlongĝjang) de Ĉinio tre similas al fluganta cigno). Ĝi simbolas, ke la provinco estas malfermita al la mondo.

La reformado kaj pordmalfermo de Ĉinio komenciĝis ĉe la sudorienta marbordo kaj nur en la lastaj jaroj disvolviĝis en la landinterno. Sub tiu situacio Heilongjiang-provinco kvarfoje okazigis tian foiron.

Kompare kun la antaŭaj, la skalo de la ĉi-foja foiro estis plej granda, ĉar ĝi havis pli vastan internaciecon. Je mencio pri karakterizaĵoj de la foiro, s-ro Cong Dacai de la Oficejo pri Alilanda Investado de Heilongjiang diris: "Antaŭe oni invitis nur entreprenistojn de la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj ŝtatoj de la Orienta Eŭropo. Kurantjare venis tien invititoj el 43 landoj kaj regionoj de la mondo. Inter ili estis malnovaj kunlaborantoj kaj ankaŭ novaj el la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj. Venis ankaŭ reprezentantoj de la entreprenoj, sciencesploraj institutoj kaj komercaj organizaĵoj de Koreio, Hongkong, Aomen, Taiwan, sudorient-aziaj, eŭropaj kaj amerikaj landoj. Plejparto de ili havas licencon pri entreprenado en Ĉinio kaj garantias vardevenon, kio realigis la kunlaboron inter Ĉinio kaj aliaj landoj kaj regionoj. La dua karakterizaĵo estas preni teknikan kunlaboron kiel la ĉefan enhavon. Antaŭe, oni faris nur varinterŝanĝan kaj kontantan komercon. Nun oni zorgas pri la kombiniĝo inter komerco kaj teknika kunlaboro kaj pri la samtempa disvolviĝo de la en- kaj eksterlanda komerco. La tria estas, ke la entreprenoj, partoprenantaj la foiron, havas solidan forton. Krom perantecaj kompanioj, pli ol 70 grandaj kaj mezgrandaj entreprenoj de ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio unuafoje partoprenis la foiron kaj fariĝis vigla forto en la ekstera komerco kaj neatenditaj estis iliaj sukcesoj. 45 altteknikaj entreprenoj el 8 altteknikaj ekspluataj regionoj de la lando partoprenis la foiron, kio kreis kondiĉon por plivastigi teknikan kunlaboron. La 53 standoj de 18 internaciaj kompanioj de ekonomia kaj teknika kunlaboro prezentis la forton de Ĉinio en laŭkontrakta konstruado por aliaj landoj kaj ekonomia kunlaboro kun ili. Krome, la eksponataj varoj estis pli bonkvalitaj ol tiuj de la antaŭaj foiroj kaj havis pli grandan debiton."

Inter la eksponaj haloj la plej altiraj estis tiuj por altteknikaj produktaĵoj, kiaj elektronikaj, kosmonaŭtikaj kaj novenergiaj produktaĵoj. Ĉi-foje oni eksponis pli ol 30 000 specojn da varoj kun 18 serioj. En la eksponejo mi vidis, ke du brodmaŝinoj, produktitaj de la Ĝenerala Fabriko de Komputila Brodado en Qingdao (Ĉingdaŭ), Shandong-provinco, altiras multajn vizitantojn. Iu junulo transdonis sian blankan ĉemizon al juna brodistino. Ĉi lasta rapide brodis sur ĝi flugantan mevon. Tiuj maŝinoj ege altiris s-ron Nikolao, direktoron de kompanio de la urala regiono en Rusio. Li invitis estron de la fabriko Li Kechong al Moskvo por kune fondi fabrikon de brodilaj ekipaĵoj. Antaŭ la stando de entrepreno, funkciigata kune de Pollando kaj Rusio, mi vidis, ke sur la ekspona tabulo estas diversaj bildoj kun teksto pri produktaĵoj. Meze de la tabulo estis afiŝo kun teksto en la ĉina lingvo: "Nia stuko servas por plibeligi vian ĉambron!" En la traktejo de kompanio de Rumanio, juna interpretistino en la ĉina lingvo konigis, ke sep filioj de la kompanio havas sian oficejon en Pekino. Estis la unua fojo por ili partopreni tian

---

Fakuloj opinias, ke tio rezultis de la kreskanta nivelo de la baza materia vivo, kuracado kaj socia garantio, kaj ankaŭ de la socia stabileco kaj malgranda premo de la vivo. Laŭ tio oni povas diri, ke ne malalta estas la nivelo de la homa klereco de Ĉinio, kaj tio rilatas la kulturan tradicion de la ĉina nacio.

## ĈINIO RESTAS DISVOLVIĜANTA LANDO

La "Raporto pri la Disvolviĝo de Ĉinio en 1992" konigis kaj taksis la nunan staton kaj forton de Ĉinio laŭ la ĝenerala stato de la naturo kaj naturaj riĉfontoj, riĉfonto de la loĝantaro kaj laborforto, ekonomia stato, industrioj primaraj, sekundaraj kaj terciaraj, pordmalfermo al eksterlando, scienco kaj tekniko, mediprotektado, konstruado de leĝa sistemo kaj internaciaj komparoj. El tio esperеblas, ke Ĉinio fariĝos unu el la avangardaj landoj de la mondo, sed nun ĝi ne estas. Rigardate laŭ sinteza nacia forto, Ĉinio ankoraŭ estas disvolviĝanta lando. ■

# norda Ĉinio




La inaŭguro de la Ekonomi-komerca Foiro

foiron kaj ili deziris fari komercon kun kompanioj de Heilongjiang-provinco, profitante la okazon. Ŝi diris: "La registaro de Rumanio ellaboris multajn politikojn por la entreprenoj funkciigataj kune de ambaŭ landoj. Nur en Bukareŝto jam servas dek ĉinaj restoracioj."

Kial la foiro de Harbin estis tiel altira? En la intervjuo vicestro Wang Zongzhang (Ŭang Zongĝang) de la provinco diris, ke la provinco ricevis la nomon Heilongjiang pro la plej granda rivero Heilongjiang en si. Inter la 19 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj Heilongjiang-provinco havas pli bonajn kondiĉojn por esti malfermita al aliaj landoj. Tie etendiĝas je 3 045 kilometroj longa landlimo inter Ĉinio kaj Rusio. La ambaŭbordaj urboj kaj vilaĝoj de la du landoj rigardas unu al alia kaj interligiĝas per akva vojo, fervojo kaj ŝoseo. Samtempe, la provinco situas en la mezo de nordorienta Azio kaj bezonas grandan kunlaboron en la kampoj de produktaĵa strukturo, komerco kaj tekniko kun Japanio, Korea Demokratia Popola Respubliko, Koreio kaj Rusio. La 5-an de junio 1990 la provinco okazigis la Unuan Ekonomian-Komercan Foiron en sia ĉefurbo Harbin. Heilongjiang-anoj miris, ke la valoro de intertraktitaj kunlaboraĵoj atingis 1.8 miliardojn da svisaj frankoj dek tagojn post la inaŭguro de la foiro.

Poste, okazis aliaj tiaj foiroj en Harbin. La komerca valoro de la Dua Ekonomia-Komerca Foiro atingis 2.68 miliardojn da usonaj dolaroj, tiu de la tria 6.2 miliardojn da usonaj dolaroj, kaj la ĉi-foja 7 miliardojn da usonaj dolaroj. Jam realiĝis la projekto de Heilongjiang-provinco en la komenca periodo post la ekpraktiko de reformado kaj pordmalfermo, t.e., "Sude okazu komerca foiro en Kantono kaj norde tia foiro en Harbin."

La Ekonomiaj-Komercaj Foiroj de Harbin ne nur alportis al la provinco ekonomian efikon, sed ankaŭ konsciigis ĉiam pli multajn politiko-ellaborantojn, ke la situa supereco povas fariĝi riĉaĵo.

En ĉiu foiro la Orienta Entreprena Grupo subskribis kontrakton kun komerca valoro de ĉ. 100 milionoj da svisaj frankoj. Antaŭe ĝi estis malgranda arkitektura entrepreno. Hodiaŭ ĝi estas translanda akcia grupo kun biena proprieto, komerco, industrio, altaj teknikoj kaj financo kiel la tuto. Ĝia enkaj eksterlanda kapitalo atingis miliardon da juanoj kaj en 1992 ĝi donis profiton kaj imposton de 72 milionoj da juanoj.

Nun, en Heilongjiang-provinco jam aperis malfermita regiono en formo de ventumilo. En ĝi, krom Harbin, estas ankaŭ la mezgrandaj urboj Qiqihar, Mudanjiang (Mudanĝjang), Jiamusi (Ĝjamusi) kaj Daqing kaj Heihe, Suifenhe, Xunke (Ŝjunke), Tongjiang (Tongĝjang) kaj aliaj 15 landlimaj urboj kaj gubernioj. La pordmalfermo starigis por Heilongjiang-provinco komercan rilaton kun la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj. Tien venis ankaŭ komercistoj kaj entreprenistoj el provincoj kaj municipo de suda Ĉinio. Nun ĉ. duono de la varoj eksportitaj el la havenurboj de la provinco estas bonkvalitaj malpez-industriaj produktaĵoj el provincoj kaj municipo de suda Ĉinio. Tio ekscitis la aktivecon de Heilongjiang-anoj por plibonigi la kvaliton de siaj produktaĵoj, tiel ke aperis forta konkurado inter suda kaj norda Ĉinio.

La bela urbo Harbin jam fariĝis fenestro por aliaj landoj en la norda parto de Ĉinio. ■

# Perdita nacio retrovita

de **WU WEN**

LA maŭzoleoj de la Okcidenta Xia(Ŝja)-regno (1038-1227) en la okcidenta antaŭurbo de Yinchuan (Jinĉŭan), la ĉefurbo de la Ningxia(Ningŝja)-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono en la nordokcidenta parto de Ĉinio, estas nomata de eksterlandaj turistoj ĉinaj piramidoj. Ili sin apogas dorse sur la montaro Helan kaj rigardas okcidenten al Yinchuan-ebenaĵo. Sur la areo de 40 kvadrataj kilometroj kuŝas 9 imperiestraj maŭzoleoj kaj 190 akompanantaj tomboj. Ĉiu maŭzoleo estas kompleta konstruaĵaro, kiu ampleksas pli ol 100 000 kvadratajn metrojn.


En 1227 la bravaj militistoj de Ĝingis-Ĥano, la unua imperiestro de Yuan-dinastio, konkeris la Okcidentan Xia-regnon kaj detruis la civilizacion kreitan de la regno. Ne tolerante la masakradon kaj kruelan subpremadon far la mongoloj, la loĝantoj de la regno fuĝis aliloken. De tiam oni ne sciis, kie forperdiĝis tiu nacio. Nun la loko estas dezerta. Krom la piramidformaj terasoj, ĉie vidiĝas rompitaj muroj, brikoj, tegoloj, ŝtonoj kaj porcelanaĵoj.

## LA PROSPERA OKCIDENTA XIA-REGNO

La nomita regno estis fondita de dangŝjang-oj, branĉo de la ĉina nacimalplimulto ĉjang-oj, transloĝiĝintaj el la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo en nordokcidenta Ĉinio. Ĝi havis la nomon "Granda Xia" kaj situis okcidente de Song-imperio, tial la historiistoj nomas ĝin la Okcidenta Xia-regno.

En la posta periodo de Mezepoko sur la ĉina teritorio estis 4 regpotencoj, t.e. la Okcidenta Xia-regno, Liao, Jin (Ĝin) kaj Song. La Okcidenta Xia-regno daŭris 190 jarojn. Se oni kalkulas ĝian vivdaŭron ekde la loka separatisma potenco fondita de ĝia prapatro Tuoba Sigong, la reĝimo do daŭris 347 jarojn entute (881-1227). Ĝi ekzistis unue kun Liao (916-1125), la Norda Song-dinastio (960-1127) kaj poste kun Jin (1115-1234) kaj la Suda Song-dinastio (1127-1279).

La maŭzoleo de la reĝo de la Okcidenta Xia-regno



La fondinto de la Okcidenta Xia-regno Yuan Hao (1004-1048) estis prudenta suvereno. Li bone konis militan arton, budhismon, juron, tibet-lingvon kaj han-lingvon. Li imperiestriĝis en 1038 kaj prenis la nunan urbon Yinchuan kiel sian ĉefurbon. Li ekspansiigis sian teritorion. En la kulmino lia regado atingis la vastan spacon inter la Flava Rivero en oriento, la nuna Dunhuang en okcidento, Huanxian(Hŭanŝjan)-gubernio de Gansu-provinco en sudo kaj Gobio en nordo. La regno kovris la grandan parton de la nuna Gansu-provinco, tutan Ningxia, nordan parton de Shaanxi(Ŝenŝji)-provinco kaj parton de Qinghai kaj la Interna Mongolio. Imite la politikan sistemon de la ĉinaj dinastioj, la pli-ol-300-jara Okcidenta Xia-regno kreis serion da politikaj kaj militaj rimedoj por sia regado. Ĝi dediĉis grandan atenton al la disvolviĝo de agrikulturo, brutobredado kaj metiindustrio. Surbaze de tio, ili starigis grandajn konstruaĵojn kaj faris multajn skulptaĵojn, kiuj fariĝis grava konsistiga parto de la ĉina kulturo.

Brutobredado kaj terkulturo estis la ĉefa parto de la ekonomio de la Okcidenta Xia-regno. Brutobredado estis tre grava por ĝi. La Flava Rivero trafluis la teron de la Okcidenta Xia-regno, kaj tie la rivero fariĝis kompare milda. De la supra baseno ĝi kunportis grandan kvanton da ŝlimo, kiu povis esti uzata kiel sterko. Jam de antikve tie konstruiĝis multaj irigaciaj instalaĵoj, kiuj ludis gravan rolon en agrikulturo kaj brutobredado. La tieaj popolanoj bredis ĉefe ŝafojn,

ĉevalojn, bovojn kaj kamelojn. Ili bredis ankaŭ azenojn, mulojn kaj porkojn. Ili kulturis hordeon, rizon, sekalon kaj drogherbojn. Dank' al la abunda produktado de lano, tie lan-tekstilado progresis. La tie produktitaj feltoj kaj tapiŝoj estis bonkvalitaj. Ili havis grandan debiton en la internacia merkato.

Dank' al la ekonomia disvolviĝo kaj akumuliĝo de riĉaĵoj, oni pli kaj pli interesiĝis pri konstruado. La imperiestroj kaj nobeloj senescepte vivis luksan vivon, aspiris luksan aranĝon de la aferoj post sia morto. Ili do elspezis multe por konstrui luksajn palacojn, templojn kaj maŭzoleojn. Yuan Hao konstruigis somerumejon en la ĉefurbo. La somerumejo konsistis el grandiozaj konstruaĵoj, kiuj sidis en la spaco de kelkaj kilometroj. La Provizora Imperiestra Palaco ĉe la orienta montpiedo de Helan estis pli grandskala. Ĝi altis ĉ. 40 metrojn. Kiel grandioza estis la konstruaĵo siatempe! Ankaŭ la aliaj imperiestraj maŭzoleoj estis grandskalaj. En 1972 oni prifosis la maŭzoleon n-ro 8. Ĝi apartenis al Shenzong (1211-1223 sur trono) de la Okcidenta Xia-regno. La maŭzoleo konsistas el gvatturoj, kioskoj, fortreso ekster la urbomuroj, interna urbo, viktimiĝa halo, terasoj, muroj interna kaj ekstera, angulaj terasoj k.a. Ili sidas simetrie ambaŭflanke de la aksolinio. Ili estas faritaj imite la arkitekturajn trajtojn de tiuj de centra Ĉinio kaj samtempe spegulas naciajn trajtojn de dangŝjang-oj.

La regantoj de la Okcidenta Xia-regno kredis je budhismo. Por popularigi budhismon ili konstruigis multajn budhismajn templojn. Historiaj libroj diras, ke siatempe budhismaj temploj vidiĝis ĉie en la lando. Sole en la ĉefurbo sidis la temploj Chengtian, Jietan (Ĝjetan) kaj Gaotai kaj stupaoj. La patrino de imperiestro Yizong (1048-1067 sur trono) de la Okcidenta Xia-regno iam monaĥiniĝis. Ŝi ordonis konstrui la templon Chengtian. Por tio mobiliziĝis dekmiloj da homoj. Nun la pagodo de la templo Chengtian majestas en Yinchuan. En Wuwei (Uŭej) de Gansu-provinco estas la pagodo Ganying, restarigita en 1094. En Zhangye (Ĝangje) de Gansu-provinco kuŝas la grandega budhostatuo 35 metrojn longa, kun ŝultroj larĝaj 7 metrojn. Ĝi estas la plej granda argila budha statuo en Ĉinio.

La regno kreis sian propran skriblingvon, imite ĉinajn ideogramojn. La skriblingvo estis populare uzata en la tuta regno. Ekde la regperiodo de Yuan Hao oni tradukis multajn budhismajn sutrojn kaj han-lingvajn klasikajn verkojn en sian propran lingvon. Ili ankaŭ kompilis diversajn librojn, kiaj tiuj de juro, novelo, poemo, proverbo, rakonto, gramatiko, medicino kaj aŭgurado, kiuj funkcias nun kiel gravaj dokumentoj por studi la politikon, militon, ekonomion kaj kulturon de la regno. Bedaŭrinde, multaj dokumentoj estis forrabitaj de eksterlandanoj. En 1908 rusa oficiro P.K. Kozloff kun sia ekspedicio dufoje forŝtelis dekmilon da originalaj literaturaĵoj kaj post 6 jaroj brita A. Stein forŝtelis grandan kvanton da materialoj.

## FORTA RIVALO DE ĜINGIS-ĤANO

Komence de la 13-a jc leviĝis la mongoloj norde de gobio. Unuiginte la mongolajn tribojn, Ĝingis-Ĥano komencis fari ekspansion. Laŭ geografia situo la Okcidenta Xia-regno estis granda baraĵo por la trupoj de Ĝingis-Ĥano en ilia atako al la regno Jin kaj Suda Song-imperio kaj militiro okcidenten. Ĝingis-Ĥano do decidis subigi ĝin. La bravaj rajdistoj gvidataj de Ĝingis-Ĥano estis ĉiamvenkaj, tamen en la batalo kontraŭ la Okcidenta Xia-regno ili renkontis fortan rivalon. Por konkeri la Okcidentan Xia-regnon la mongoloj batalis tutajn 20 jarojn ekde 1205.

En 1225 reveninte de la militiro, Ĝingis-Ĥano decidis ataki la Okcidentan Xia-regnon. Printempe de la sekvanta jaro li lanĉis atakon al la regno per tenajla manovro. La militistoj kaj popolanoj de la Okcidenta Xia-regno faris firman kontraŭagresan kaj nacisavan batalon. La trupoj de la mongola generalo Adaĉ sturmis Dunhuang. La generalo de la Okcidenta Xia-regno false kapitulacis, sed fakte aranĝis embuskon. En la batalo Adaĉ estis preskaŭ kaptita. Por konkeri la urbon, la mongoloj nokte fosis kavon ĉe la urbomuro, tamen la defendantoj batis ilin per fajro. La mongolaj trupoj suferis gravan perdon. Ili estis forte baritaj en la Koridora Regiono Okcidente de la Flava Rivero. Novembre, Ĝingis-Ĥano gvidis trupojn por ataki Lingwu. La mongolaj rajdistoj sturmis la malamikojn sur la glaciiĝinta rivero. Rashid al-Din Fadl Allah (1247-1318) notis en sia verko: "La batalo estis tiel intensa, ke la mongoloj neniam spertis tion antaŭe. La komandantoj kaj batalantoj de la Okcidenta Xia-regno brave rezistis, tamen fine malvenkis." La urbo estis konkerita de la mongoloj, kiuj do direktis sian lancopinton al la ĉefurbo de la Okcidenta Xia-regno. Post duonjara rezisto, pro manko de provianto kaj helpantoj la suvereno de la regno sendis kapitulaci al la malamikoj, kondiĉe ke post unu monato li fordonos la urbon. Tiam Ĝingis-Ĥano jam grave malsaniĝis kaj mortis julie de 1227. Por venĝi siajn batalantojn kontraŭ la malamikoj, Ĝingis-Ĥano testamentis al siaj subuloj: "Vi ne faru funebrajn aferojn por mi por trompi la malamikojn. Kiam la malamika regnestro kaj liaj subuloj eliros el la urbo en difinita tago, vi tuj ekstermu ilin senrezerve!" Observante la testamenton de sia ĉefo, la mongoloj faris masakradon en la tuta urbo. Ili detruis ankaŭ la maŭzoleojn. Pro tio granda kvanto da literaturaĵoj de la regno estis grave detruita.

La mongoloj unuigis Ĉinion kaj fondis la dinastion Yuan (1271-1368). Ĝia kortegano Tuotuo (1314-1355) kompilis la librojn "Historio de Song", "Historio de Liao" kaj "Historio de Jin", sed li ne kompilis historian verkon por la Okcidenta Xia-regno eble pro la forta malamo. Pro tio la historio de la Okcidenta Xia-regno nun estas

*(Daŭrigo sur p. 12)*

CUI LILI:


# *La Pekina Universitato en reformado*

EN la komenco de la kuranta jaro la Pekina Universitato, unu el la plej grandaj altlernejoj de Ĉinio, decidis faligi sian sudan kortomuron 600 m longan kaj tie starigi antikvastilan konstruaĵaron kun areo de 24 000 kvadrataj metroj. La konstruaĵaro el sinteza industria domego, elektronika kaj komputila domego, ĉiovendejo, restoracio kaj domego por fajnaj produktaĵoj estos transdonita al uzado fine de 1994.

La ago vekis vastan diskutadon en kaj ekster la universitato. Nemalmultaj de la Pekina Universitato timas, ke tio eble ne bone influos la universitaton, kiu havas kvietan medion kaj historion de cent jaroj.

Pro tio mi intervjuis profesoron

En la scienc-esplora sekcio de la kompanio Weiming



Wang Yiqiu (Ŭang Jiĉiŭ), konstantan vicdirektoron de la Pekina Universitato. Li konigis, ke en la dekoj da jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio, dank' al siaj plej bona instruista vicaro, plej kompletaj fakoj, bonkvalitaj instalaĵoj kaj distingiĝaj instruaj metodoj, la Pekina Universitato, kun bazaj sociaj kaj naturaj sciencoj kiel la ĉefaj, elkulturis grandan nombron da altnivelaj fakuloj kaj akiris multajn elstarajn atingojn en studo pri bazaj teorioj kaj altaj sciencoj. Tamen en la hodiaŭa ekonomia reformado pli kaj pli evidentiĝas la tendenco funkciigi lernejon per siaj propraj fortoj. Eĉ famaj universitatoj, kia la Pekina Universitato, jam ne povas sin vivteni, se ili dependas nur de limigita poreduka subvencio de la ŝtato.

Tial, la Pekina Universitato faris provojn por reformado. Unu el ili estas servigi siajn intelektajn kaj teknikajn superecojn rekte al la socio, kio ne nur akcelos la disvolviĝon de la sociaj produktaj fortoj, sed ankaŭ donos profiton al la universitato, plibonigos la studkondiĉojn kaj pluapaŝe rapidigos la disvolviĝon de scienc-esplorado.

Li daŭrigis, ke universitato alfrontas ĉefe merkaton de talentuloj kaj profesioj. Laŭ la bezono kaj ŝanĝiĝo de la merkato oni juĝas kaj ekzamenas la socian efikon de instruado. Tio ege gravas same por la ekzistado de la Pekina Universitato.


## SOCIA SERVO KAJ EDUKAJ MONRIMEDOJ

Fine de 1986, fondiĝis la Altteknika Kompanio de la Pekina Universitato, unu el la plej fruaj kompanioj de la universitato. Post nelonge, sub la gvido de profesoro Wang Xuan (Ŭang Ŝjŭan) de la Pekina Universitato, oni sukcese inventis la ĉin-lingvan elektronikan kompost-sistemon Fangzheng (Fangĝeng). Kun specifa pensado, avangardaj teknikoj, fidinda kvalito kaj racia prezo la sistemo gajnis la enlandan merkaton kaj vendiĝis eksterlande. Krome, la kompanio faris multajn produktaĵojn. Nun, kun produktovaloro de 300 milionoj da juanoj ĝi okupas la trian lokon inter la entreprenoj de la altteknika ekspluata distrikto de Pekino.

Post Fangzheng la Pekina Universitato fondis pli ol 20 kompaniojn. Inter ili plej prosperas la Bioinĝenieria Kompanio Weiming de la Pekina Universitato. La kompanion fondis la 31-jara biologia profesoro de la universitato Chen Zhangliang (Ĉen Ĝangljang), kiu ĝuas reputacion en kaj ekster la lando.

La biologia fakultato estas unu el la malmultaj fakultatoj de la Pekina Universitato, kiuj havas ŝtatan laboratorion. Tamen antaŭ duonjaro la pokapa monata enspezo de la instruistoj kaj oficistoj de la fakultato okupis unu el la lastaj lokoj inter la fakultatoj de la universitato. Julie de 1992, Chen Zhangliang ekfunkciis kiel dekano de la biologia fakultato. Li bone sciis, ke ekonomio estas bazo de ĉio kaj estas necese antaŭ ĉio ŝanĝi la nebonan ekonomian situacion de la fakultato.

La kompanio Weiming, gvidata de Chen Zhangliang, subskribis kun koncernaj entreprenoj dekkelkajn kontraktojn pri ekspluatado



En la vendejo de la kompanio Pekin-Canon funkciigata de la Pekina Universitato kaj la korporacio Canon de Japanio



S-ro Chen Zhangliang (maldekstre) kaj liaj kolegoj

de novaj produktaĵoj kaj vendado de altaj teknikoj. La entreprenoj tre ĝojis starigi kontakton kun la unuaranga universitato kaj supera scienc-esplora instituto de la ŝtato kaj ricevi ĝiajn fajnajn produktaĵojn. Dume la biologia fakultato gajnis ekonomian profiton. Iuj importitaj avangardaj ekipaĵoj, ne uzitaj pro manko de monrimedoj, komencis funkcii nun.

Profesoro Wang Yiqiu diris al mi, ke la nova komerca strato pligrandigos la skalon de la entreprenoj funkciigataj de la universitato, kaj fondiĝos ankaŭ tiaj entreprenoj, kiaj Fangzheng kaj Weiming. Post malpli ol du jaroj multe kreskos la enspezo de la 7 000 instruistoj, oficistoj kaj laboristoj de la universitato.

## ĈIAMANIERE KULTURI FAKULOJN

"Krom funkciigi kompaniojn, la Pekina Universitato ankaŭ komencis reformi siajn edukajn principon kaj enhavon en la nova situacio," akcentis vicdirektoro Wang.

Meze de la 80-aj jaroj, sur la ĉina merkato de fakuloj aperis du tendencoj: Unue, por adaptiĝi al la moderna scienteknika disvolviĝo, altrangaj organizaĵoj, kiaj akademio kaj instituto, urĝe bezonas esplor-studentojn kaj kandidatojn por doktoreco; due, la socio bezonas grandan nombron da diversaj fakuloj. "Tio serioze defias la Pekinan Universitaton, kiu dum dekoj da jaroj kulturis ĉefe studentojn, instruistojn kaj esplorantojn pri bazaj teorioj, kiuj estas for de la praktiko," diris Wang.

Kontraŭ la defio naskiĝis la principo "ĉiamaniere kulturi esplorajn kaj praktikajn fakulojn samtempe".

Gvidate de la principo, en la lastaj jaroj la nombro de esplorstudentoj de la Pekina Universitato kreskis de 260 en la 60-aj jaroj al ĉ. 3 000 kaj okupis la unuan lokon en ĉiuj altlernejoj de Ĉinio. La nombro de fakoj por magistreco starigitaj de ĝia Kolegio de Esplorstudentoj kreskis al 132. Krome, la universitato havas 91 punktojn por doktoreco kaj starigis aŭ starigos nefiksajn postdoktoriĝajn staciojn kun 42 fakoj.

Tio estas grava garantio, ke en la venonta jarcento la Pekina Universitato daŭrigos siajn altnivelan sciencesploradon kaj edukadon kaj daŭre preparos por la ŝtato talentulojn pri altaj teknikoj aŭ bazaj teorioj. Fakte, en la lastaj jaroj ĝiaj diplomitaj magistroj kaj kandidatoj por doktoreco plejparte ludis gravan rolon sur la posteno.

Alia postulo de la principo estas starigi pluruzajn studobjektojn kaj fari reformadon al enhavo de la kursoj, por ke du trionoj de la studentoj fortigu sian praktikan kapablon.

En 1993 la fakultato de bibliotekaj informoj de la universitato ricevis la novan nomon informadministra fakultato. Dank' al tio, la nombro de fakoj de la fakultato kreskis de du al kvar, kaj samtempe estis starigitaj pli multe da studtemoj kaj studobjektoj. Ankaŭ la fakultato pri orientaj lingvoj kaj literaturaĵoj ricevis la novan nomon fakultato pri orientismo.

La reformado en la informadministra fakultato kaj fakultato pri orientismo donis bonan ekzemplon en la Pekina Universitato. Laŭ nekompleta statistiko, ekde 1984 la universitato starigis pli ol 180 novajn sociologiajn kaj natursciencajn fakojn, i.a., la nombro de novaj sociologiaj fakoj superis trionon de tiu de la antaŭaj. La nove starigitaj fakoj plejparte estas praktikaj kaj teknikaj, urĝe bezonataj de la ekonomia konstruado, ekz., la nove starigitaj fakoj de la Ekonomika Kolegio de la Pekina Universitato estas de entreprena administrado, internacia financo kaj komerco, financo, internacia juro, ekonomika leĝo kaj aliaj. La novaj 1 292 kursoj plejparte estas starigitaj laŭ la bezono de merkato. Krome, la universitato ankaŭ kuraĝigas la studentojn elekti nedevigajn studobjektojn transfakajn kaj akiri duoblan licencion por pli bone plenumi profesian laboron. En la lastaj jaroj centoj da studentoj ricevis ateston de duobla licencio.

"Antaŭe en la Pekina Universitato la instruado pri bazaj teorioj disiĝis de la praktiko, kio ne bone efikis sur la diplomitojn. Instrua reformado celas, ke la studentoj tenu sian superecon, forigu sian malfortaĵon kaj fortigu sian akomodiĝon al la socio," aldonis vicdirektoro Wang Yiqiu ĉe la fino de la intervjuo. ■

(*Daŭrigo de p. 9*)

nebuleca kaj oni ne klare scias, kien fuĝis popolanoj de la regno siatempe.

### KIE ESTAS POSTEULOJ DE LA OKCIDENTA XIA-REGNO

Kun forta intereso historiistoj ĉinaj kaj alilandaj faris longatempan esploradon pri la nacio de la Okcidenta Xia-regno malaperinta en la 13-a jc.

En la 30-aj jaroj de la 20-a jc brita fakulo diris, ke la lingvo parolata de la loĝantoj de Muya en la nuna Garze, Sichuan-provinco, estas simila al tiu de la Okcidenta Xia-regno. Li hipotezis, ke parto de la loĝantoj de la Okcidenta Xia-regno translokiĝis suden por eviti masakron far la trupoj de Ĝingis-Ĥano. Post plurjara esplorado ĉinaj historiistoj venis al la konkludo, ke la loĝantoj de la Okcidenta Xia-regno translokiĝis laŭ 3 direktoj. Sennombraj materialoj montris, ke la origina loĝloko de dangŝjang-oj ja estis proksime al Muya. Oni diras, ke post pereo de la regpotenco parto de la loĝantoj de la Okcidenta Xia-regno fuĝis en la loĝlokon de siaj prapatroj. Pro tio la tiea kulturo nun estas tute malsama ol la tibeta kaj simila al tiu de la regno. Alia parto de la loĝantoj de la regno fuĝis en la nunan Angren (Angĵen)-gubernion de Xigaze de Tibeto kaj alportis tien siajn religiajn rakontojn kaj naciajn morojn. La lasta parto translokiĝis en Dongxiang (Dongŝjang) kaj Bao'an de la nuna Linxia(Linŝja)-a Hujnacia Aŭtonoma Subprovinco de Gansu. Ili poste konvertis islamon. Kaj iuj loĝantoj de la regno translokiĝis aliloken, ĉar ili ne havis tempon foriri kun granda amaso da fuĝantoj post pereo de la regno. Septembre de 1962, norde de Baoding, Hebei-provinco, arkeologoj elterigis 2 ŝtonajn kolonojn kun skriblingvaj signoj de la Okcidenta Xia-regno ĉizitaj sur ili. La kolonoj estis faritaj en 1502, sur ili legiĝas pli ol 80 nomoj de loĝantoj de la regno. Tio montris, ke en la 16-a jc multaj membroj de la Okcidenta Xia-regno loĝis en Baoding. ■

# Abonu kaj abonigu "El Popola Ĉinio"

*Kara leganto,*

***Kun granda ĝojo ni informas vin, ke ekde 1994, anstataŭ la Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio, ni mem prizorgos la distribuadon de "El Popola Ĉinio" kaj eldonaĵoj en Esperanto kaj rekte akceptos abonojn kaj mendojn de niaj perantoj kaj legantoj.***

***La nova tasko signifas novajn klopodojn, kaj ni faros ĉion eblan por servi al vi kiel eble plej kontentige. Tamen ni konscias, ke mankas al ni sperto pri distribuado. Sekve, viaj proponoj kaj konsiloj nepre necesas kaj tre bonvenas. Se iam okazos fuŝoj en nia distribuado, kiuj niasupoze neeviteblos ĉe la komenco, bonvolu ne heziti turni vin al ni kun kritikoj kaj eblaj solvoj.***

***Jen temas pri abon- kaj pagmanieroj. Se vi abonas ĉe peranto en via lando, bonvolu sendi al tiu la plenigitan abonilon kaj abonpagon. Se vi abonas rekte ĉe ni, bonvolu sendi la abonilon kaj pagon al la Distribua Fako de "El Popola Ĉinio", P.O. Kesto 77, CN-100037 Beijing, Ĉinio. En la ĉi-lasta kazo vi povas sendi ĉekon en usonaj dolaroj aŭ en valuto ŝanĝebla al usonaj dolaroj aŭ egalvalorajn internaciajn respondkuponojn aŭ pagi pere de vialoka banko al la konto 71411749 je la nomo de "El Popola Ĉinio" ĉe Bank of China (Banko de Ĉinio) en Beijing. Ĉi-sube vi trovas abontarifon por 1994.***

***Kun la espero, ke vi daŭre ĝuos nian revuon en 1994, ni multe dankas vin pro via atento pri la ĉi-supra informo kaj pro via abono kaj abonigo.***

**La Red.**

## ABONTARIFO DE EPĈ POR 1994

| Lando | Valuto | Abonprezo | Sendkosto | Totalo |
|---|---|---|---|---|
| Aŭstralio | AUD | 19,00 | 16,00 | 35,00 |
| Aŭstrio | ATS | 192,00 | 128,00 | 320,00 |
| Belgio | BEF | 575,00 | 375,00 | 950,00 |
| Britio | GBP | 10,00 | 6,00 | 16,00 |
| Germanio | DEM | 28,00 | 18,00 | 46,00 |
| Finnlando | FIM | 61,00 | 50,00 | 111,00 |
| Francio | FRF | 88,00 | 62,00 | 150,00 |
| Israelo | USD | 14,00 | 12,00 | 26,00 |
| Italio | ITL | 20200,00 | 13800,00 | 34000,00 |
| Japanio | JPY | | | 4200,00 |
| Kanado | CAD | 17,00 | 15,00 | 32,00 |
| Nederlando | NLG | 28,00 | 23,00 | 51,00 |
| Nov-Zelando | NZD | 26,00 | 22,00 | 48,00 |
| Svisio | CHF | 23,00 | 17,00 | 40,00 |
| Usono | USD | 14,00 | 12,00 | 26,00 |
| TARIFO A | USD | 14,00 | 12,00 | 26,00 |
| TARIFO B | USD | | | 15,00 |
| TARIFO C | USD | | | 10,00 |

| | |
|---|---|
| TARIFO A: | Ĉiuj landoj en Eŭropo escepte de tiuj menciitaj en la kategorio TARIFO C. |
| TARIFO B: | Korea Respubliko, Singapuro, Hongkong, Turkio, Meksikio kaj ĉiuj landoj en Latin-Ameriko. |
| TARIFO C: | Ĉiuj landoj de Orienta Eŭropo (inkluzive de Latvio, Litovio, Estonio, Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj eks-Jugoslavio) kaj ĉiuj ceteraj landoj en Azio kaj Afriko ne menciitaj supre. |

# 12-taga itinero Pekino — Nankino — Huangshan-monto — Hangzhou

de **GUAN LI**

EN Ĉinio cirkulas legendo, ke prapatro de la ĉina nacio Huangdi memkulturis kaj rafinis pilolojn en profundo de la monto Huangshan. En Huangshan-monto ĉiuj turistoj havis la impreson, ke ili kvazaŭ estis en homa paradizo.

Mi proponas al vi la 12-tagan itineron por viziti Huangshanmonton. Vi povas veni en ĉiu ajn sezono de la jaro. En printempo kaj aŭtuno vi kun ĝojo rigardas ĝiajn mirindajn pejzaĝojn, en somero somerumas, en vintro ĝuas neĝan pejzaĝon... Ĝi ĉiam donas al vi apartan ĝuon.

Vi povus enlandiĝi en Pekino. La unuajn tri tagojn vi vojaĝos en Pekino kaj la sekvantajn du tagojn en Nankino, kaj de tie vi trajne veturos al antikva urbeto Tunxi. Jen vi jam atingis la piedon de Huangshan-monto.

En Ĉinio Huangshan-monto estas rigardata kiel "la plej mirinda monto sub la ĉielo". Ĝi famas pro siaj mirindaj pinoj, groteskaj rokoj, nubomaro kaj termofonto. En la areo de 154 kvadrataj kilometroj staras 72 montpintoj, kiuj formas belajn vidindejojn. Ĝuste dank' al tio ĝi fariĝis unu el la dek famaj pitoreskejoj de Ĉinio.

Sur Huangshan-monto ĉie kuŝas groteskaj rokoj. Ili en diversaj formoj ricevis la nomojn "Transsaltanta sciuro", "Feo kolektanta drogojn", "Plumingo" k.a. Post konciza klarigo de ĉiĉerono vi tuj sentos, ke la nomoj estas identaj kun la formoj, kaj vi ankaŭ informiĝos pri multe da interesaj rakontoj koncerne ilin. Dum montgrimpado vi kaj rigardos groteskajn rokojn kaj aŭskultos interesajn rakontojn pri ili. Vi sentos neniom da laco.

La antikvaj pinoj sur Huangshan-monto havas renomon. Oni diras, ke "sur Huangshan ne estas roko sen pino kaj ĉiu pino kuriozas senescepte." La pinoj sur la monto ne nur estas multspeciaj kaj multjaraj, sed ankaŭ diversformaj. La "Gastama pino", alte staranta sur krutaĵo, kun etenditaj branĉoj, fervore bonvenigas turistojn.

Tie la monto estas alta, ravinoj profundaj, pluvo abunda, pro tio formiĝis ŝanĝiĝema nubomaro, kiu konsistas el la maroj norda, okcidenta, orienta, ĉiela kaj fronta. Kiam vi staras sur la monto por spekti nubomaron, vi sentas, ke vi staras kvazaŭ super nubotavolo kaj la nubaro fluas en valo.

Termofonto de Huangshanmonto estas pura, klara. Ĝia temperaturo ĉiam estas ĉ. 42°C. Ĝi taŭgas por bano kaj trinko.

Al ĉiuj vidindejoj sur la monto estas ŝtonŝtupoj kaj sekura kablotramo. Oni atingas la montosupron per kablotramo nur en 8 minutoj. Sur ĝi oni povas ĝui la pejzaĝojn nevideblajn surtere.

Vi restos kvar tagojn en hotelo sur la monto. En tiuj tagoj vi povos laŭplaĉe spekti ĉiun ajn vidindejon. Estas tre oportune por iri al ĉiu el ili.

Lianhua-montpinto 1 873 metrojn super la marnivelo estas la plej alta punkto de la monto Huangshan. Ĝi kun malgrandaj pintoj en la ĉirkaŭaĵo aspektas kiel prospera lotusfloro. Sur la deklivo al la pinto imponas famaj ŝtongravuraĵoj, kia "Bona aŭguro", kaj mirindaj pinoj, kiaj "Fluganta drako" kaj "Pino inverse kreskanta". Atinginte la pinton, vi ĝuos steleojn kun surskriboj "Amaso de ĉielskrapantaj krutaĵoj" kaj "Interne inteligenta, ekstere sensprita". Tie antaŭ vi prezentiĝos senlima ĉielo, kaj vi forgesos ĉiujn viajn ĉagrenojn kaj malĝojojn.

Guangmingding-montpinto, la dua montpinto de Huangshan, impresas vaste. Sur ĝi vi povos rigardi sunleviĝon en mateno kaj nubomaron en vespero, groteskajn rokojn kaj mirindajn montpintojn.

Tiandu estas la tria montpinto de Huangshan. Ĝia supro, la plej danĝera loko sur la monto, aspektas kiel karasa dorso. La kruta ŝtona ŝtuparo estas preskaŭ vertikala, ambaŭflanke de ĝi staras apikaj krutaĵoj. Dum la ascendado oni devas kapti la feran ĉenon. La supro de Huangshan-monto estas ebena. Tie vi povos rigardi ondantan nubomaron kaj ĉielskrapantajn montpintojn en la ĉirkaŭaĵo.

Unuvorte, en tiuj kvar tagoj ĉiu ajn loko, kiun vi vizitos, donos al vi belan ĝuon. ■

SABIRA STÄHLBERG (Finnlando):

# Pilgrimo, legendo, pentraĵo

## — La fenomeno Xuanzang

LA monaĥo kaj pilgrimanto Xuanzang (602-664) estas unu el la plej famaj ĉinoj en la mondo. Lia vivo estas multe priskribita kaj liaj verkoj estas daŭre uzataj de diversaj sciencistoj. Kion do li faris?

Xuanzang promenis. Tio sonus tre banale, sed se ni konsideras, ke li promenis de Ĉinio al Hindio kaj reen, tra dezertoj, trans montoj kaj preter lagoj, en la 7-a jarcento, kaj ke li post sia reveno al Ĉinio ankoraŭ tradukis plurajn dekojn da budhismaj sutroj kaj verkis priskribon pri sia vojaĝo, ni iom pli komprenas lian grandiozan vivon. Jam frue en sia vivo Xuanzang deziris iri al Hindio por, kiel li mem diris, "porti la veran budhismon al la oriento". En 629 li efektivigis sian vojaĝon, kontraŭ la malpermeso de la imperiestro, kaj li vagis tra diversaj urboj de mezaziaj landoj, spertante la lokajn kutimojn kaj gastamon de la reĝoj. Li estis eĉ en granda turka kunveno (kiam la turkoj ankoraŭ havis grandan ŝtaton en Azio), kaj li priskribis poste en sia libro, kiel aspektis la urboj, kion la homoj pensis kaj kion ili faris. En Hindio li studis en budhisma universitato kaj vizitis diversajn interesajn lokojn, kie ankaŭ Budho siatempe estis. Nur en 645 li revenis al Chang'an, la tiama ĉina ĉefurbo, kaj li iĝis bona amiko de la imperiestro. Li estis tre honorata kaj amata, kaj jam dum li vivis, homoj komencis rakonti miraklajn aferojn pri lia vojaĝo. Tiuj rakontoj poste iĝis libro "Pilgrimado al la Okcidento".

La romano estas tre ampleksa kaj konsistas el diversaj aventuroj de Xuanzang kaj liaj disĉiploj, la simio Sun Wukong, la porko Zhu Bajie, la monaĥo Sha Heshang kaj la draka ĉevalo. Tiuj kunvojaĝantoj savas la nun tre malkuraĝan Xuanzang el diversaj malfacilaj situacioj, kie monstroj volas manĝi lin, aŭ kie li preskaŭ estas dronigita, aŭ kie demonoj intencas kaj foje eĉ sukcesas forŝteli lin. La grupo alvenas fine en la paradizon, ricevas sutrojn de Budho kaj revenas al Chang'an. Tiu romano estis verkita de Wu Cheng'en (1500-1582), kiu kompilis kaj la legendojn pri Xuanzang kaj diversajn folklorajn elementojn en unu verkon. Pro la aventuroj la romano estas unu el la plej popularaj en Ĉinio eĉ hodiaŭ.

La tria formo de Xuanzang estas la pentraĵo: en diversaj pentraĵoj trovitaj en Dunhuang en Mezazio oni povas vidi vagantan monaĥon, kiun oni kutime difinas kiel Xuanzang. Sed ne nepre estas tiel: en kelkaj bildoj klare videblas, ke la monaĥo estas neĉino, kaj krome ekzistas kelkaj pentraĵoj, kie li kunportas librojn aŭ promenas kun tigro. Paralele ekzistas pentraĵoj el Mongolio kaj Tibeto, kie iu monaĥo genuas, kaj apude staras tigro. Estas tre konfuze: kiu estas la persono? Aŭ ĉu eble estas pluraj personoj?

Post multaj komparoj ankaŭ kun aliaj ĉinaj, mezaziaj kaj koreaj pentraĵoj (en Koreio ekzistas pentraĵoj, kie la Monta Spirito sidas apud tigro), mi venis al la konkludo, ke devas temi pri diver-



Xuanzang (sidanta surĉevale) kaj liaj disĉiploj pilgrimantaj al la okcidento

LI QIANG:

# Selenoriĉa regno

INTER Wuling-monto kaj Daba-monto de Ĉinio estas mistera bela loko. Tie vidiĝas strangaj aferoj:

Ĉi tie la meznombra vivdaŭro de la lokanoj superas 75 jarojn, je 10 jaroj pli longa ol tiu de la ĉinaj loĝantoj.

La morbokvanto de kancero kaj kardiovaskula malsano estas je 75% pli malalta ol tiu de la tuta lando. En iuj partoj de la loko neniu kazo de kancero okazis dum la pasintaj 20 jaroj.

Ĉi tie la 80-jaruloj estas energiaj. Ili daŭre laboras surkampe.

Ĉi tie la knabinoj eĉ sen ŝminko estas belaj, kaj ĉiu kun delikata haŭto.

Sur tiu ĉi ŝajne sterila tero kreskas tamen verdverdaj plantoj.

Kio kaŭzis ĉion ĉi?

En la 80-aj jaroj ĉinaj sciencistoj venis al tiu mistera loko en Jianshi(Ĝjanŝi)-gubernio, Exi-(Eŝji)-a Tuĝja-mjaŭ-nacia Aŭtonoma Subprovinco de Hubei. Post esplorado ili konkludis, ke tion oni devas atribui al seleno. Jianshi-gubernio estas abunda je seleno, kies entena areo ampleksas 475.19 kvadratajn kilometrojn. Tie rezerviĝas 500 milionoj da tunoj da gango riĉa je seleno. Ĉiutage elfluas 150 tunoj da minerala akvo kun seleno kaj stroncio. Pro tio oni nomas la lokon selenoriĉa regno.

Antaŭe seleno ne estis atentata. Nur en 1953 oni trovis la rilaton inter seleno kaj hepata nekrozo kaj miokardiaj malsanoj. En 1973 la Monda Higiena Organizo publikigis, ke seleno estas nemankigebla mikroelemento por la animala vivo. Sciencistoj nomas selenon fajro de vivo kaj fortulo kontraŭ kancero, pro tio seleno fariĝis multe atentata.

Tamen en pli ol 40 landoj mankas seleno. Ankaŭ en Ĉinio troviĝas selen-manka zono, kiu sin etendas de la Nordoriento ĝis la Sudokcidento. 300 milionoj da ĉinaj loĝantoj vivas en la loko. Keshan-malsano, endemio de ostoartika misformo k.a. estas kaŭzitaj ĝuste de manko de seleno. Pro tio Ĉinio fariĝis la dua lando, kiu importis multe da seleno. Oni senpacience atendis, ke la ŝtato ekspluatu sian propran selenon kiel eble plej baldaŭ.

Oni trovis grandkvantan selenon en Jianshi-gubernio, kio vekis la gubernion dormantan en la profunda montaro. Ekspluati selenon fariĝis grava konsistiga parto de la ekonomia disvolviĝo de la gubernio.

Je 5 km for de la gubernia urbo ŝprucas fonto kun seleno, stroncio kaj aliaj 20 mikroelementoj, utilaj al prevento de kancero, Keshan-malsano, endemio de ostoartika misformo kaj diabeto. Ili estas utilaj ankaŭ al la prokrasto de senileco. La tiea minerala akvo nun estas multe atentata de en- kaj eksterlandaj personoj. Somere de 1992, entreprenisto venis ĉi tien de Aomen. Post plurfoja esplorado li subskribis kun lokaj aŭtoritatoj kontrakton pri kuna investo por ekspluati la tiean mineralan akvon. Sekve de tio, aperis la unua entrepreno kune investita en la gubernio.

En la gubernio estas ankaŭ plurspecaj seleno-teoj, faritaj post 9 laborprocedoj el bonkvalitaj kaj freŝaj folioj deŝiritaj de sur te-arboj kreskantaj en la naturaj selenoriĉaj medioj. Ili konsistas ĉefe el ruĝa teo kaj verda teo. La "Selenoriĉa Verda Teo" estas delikatstria, okulplaĉa kaj aroma. Ofta trinkado de ĝi estas utila por preventi malsanojn, prokrasti senilecon kaj fortikigi la sanon.

En Jianshi kreskas multspecaj selenoriĉaj vegetaĵoj, inter kiuj estas 40 specoj da agrikulturaj plantoj. Estas ideala sanprotekta kaj nutroriĉa la manĝaĵo kun selenoriĉa proteino ekstraktita el sojfabo, maizo kaj arakidnukso. La ekzameno pruvis, ke ĝi entenas ne nur selenon, zinkon, stroncion, manganon kaj aliajn mikroelementojn bezonatajn de la homa korpo, sed ankaŭ 8 specojn da aminaj acidoj.

Nun Jianshi-gubernio produktas ankaŭ selenoriĉajn cigaredojn, fungojn, drogherbojn, abelreĝinan gelatenon, kuiroleon, vinon k.a. Iuj el ili ne nur vendiĝas en la lando, sed ankaŭ havas grandan debiton en la internacia merkato. Dank' al sia abunda seleno, la gubernio altiras al si multajn en- kaj eksterlandajn entreprenistojn, kiuj veturas al Jianshi por kontrakti pri kuna investado de ekspluato de la tieaj riĉaĵoj. ■


---

saj tradicioj, sed ke la persono, kiun oni kutime difinas kiel Xuanzang, origine estis alia persono, kaj ke la ikonografio de tiu antaŭa persono (kiu eble estas nur legendo) simple transiris al la persono Xuanzang en Ĉinio.

Konklude mi povus diri, ke neniam antaŭe estis farita kompleta analizo pri la persono Xuanzang nek pri la postaj literaturaj kaj pentraĵaj figuroj. Mi provis mallonge resumi miajn esplorojn ĉi tie, esperante ke la temo instigos plurajn personojn al legado de i.a. la romano (kiu estas tradukita en plurajn lingvojn). La originalo de mia esploro estas en la sveda (142 paĝoj), kun resumo en la angla (33 paĝoj). ■

SUR NIA LIBROBRETO

# Esperanto — iam danĝera lingvo




de **IVAN KO**

*LA DANĜERA LINGVO*, studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto, verkita de Ulrich Lins, eldonita de Bleicher Eldonejo, 546 p. Prezo neindikita.

Esperantistoj, kiuj interesiĝas pri la historio de Esperanto kaj iam legis unu aŭ du librojn tiurilate, apenaŭ trovis en ili esploron pri la kontraŭstaro aŭ persekutoj, kiujn renkontis Esperanto fojon post fojo en diversaj landoj, jam ne parolante pri detala kaj profunda studo pri tiu temo. La verko de Ulrich Lins eldonita antaŭ kelkaj jaroj faris grandan, originalan kontribuon al tiu specifa aspekto de nia movado.

La legantoj de tiu verko povas rimarki, ke Esperanto alfrontis malamikecon ekde la momento, kiam ĝi naskiĝis. La Deklaracio de Bulonjo difinis, ke ĉiu rajtas uzi la lingvon laŭ sia plaĉo. Poste, kun sia disvastiĝo al multaj landoj Esperanto trovis sin antaŭ diversaj malhelpoj kaj obstakloj en Eŭropo kaj ankaŭ en Azio. La strebado al sendiskriminacia interhoma komunikado elvokis suspekton, malŝaton kaj rezistadon. Foje nederlanda socialisto Willem van Ravesteyn nomis la Esperanto-movadon "burĝa malsaĝaĵo". La varba kunveno de esperantistoj en la hungara urbo Szekesfehervar estis malpermesita de policestro — laŭdire sub la preteksto, ke ili uzas "ŝtelistan lingvon". Aliflanke, en la nazia Germanio Gestapo nomis Esperanton "sekreta lingvo de komunistoj".

En multaj landoj en Eŭropo Esperantaj organizoj kaj kursoj estis malpermesitaj. La esperantistoj estis devigitaj rezigni agadon por la Esperanto-movado, kaj multaj el ili estis persekutitaj. En la antaŭa Sovetunio, kie foje prosperis la Esperanto-movado, multaj esperantistoj estis arestitaj aŭ mortigitaj dum la granda purigo.

Ankaŭ en la malnova Ĉinio la Esperanto-movado kaj esperantistoj spertis preskaŭ la saman sorton. Sub la regado de la kuomintanga registaro la sekreta polico ofte aperis en Esperanto-grupoj aŭ en novaj kursoj, vizitis esperantistojn en iliaj hejmoj, sekvis ilin tra la strato, kontrolis iliajn poŝtaĵojn, malpermesis ilian agadon kaj arestis ilin. Foje la kuomintanga veterano Wu Zhihui (U Ĝihuj) estis petita interveni, ĉar oni memoris, ke iam li, en la pariza *Xinshiji,* entuziasme rekomendis Esperanton kiel lingvon de la estonta mondo bazita sur anarkiismo. Sed ĉirkaŭ 1940, post tri jardekoj, lia revolucia fervoro estis tiom estingiĝinta, ke li rifuzis helpi: "Ho, nun ne estas ĝusta tempo por esperantaĵo!"

En Taiwan, kiam ĝi estis sub la okupado de Japanio, Esperanto-kurso estis aranĝita de japana esperantisto, kaj li instruis al dekkelkaj personoj. La polico sendis senuniformajn anojn por informiĝi pri la enhavo de la lecionoj, kaj la instruisto devis unufoje monate raporti al la policejo pri la agado de siaj kursanoj. Tamen, post la Unua Mondmilito, kulminis la indigno de Taiwan-anoj kontraŭ la koloniisma politiko de Japanio. Unu el la esprimiloj de la protesto de la intelektuloj estis Esperanto. La Esperanto-movado en Taiwan organiziĝis en ligo kun ĉiam kreskanta deziro de nejapanaj loĝantoj por emancipiĝo.

Travivinte multe da maljustaĵoj kaj afliktoj Esperanto nun aĝas pli ol cent jarojn. La aŭtoro diris en la fino de tiu verko, ke la ekzisto de Esperanto servas kiel admono, ke en teknike kuntiriĝanta kaj pli kaj pli raciigita mondo la pli bona kompreniĝo inter la homoj ne bezonas esti utopio.

Kiel valora historia verko de Esperanto kaj grava, akademia studaĵo, tiu libro meritas rekomendon al la esperantistoj de ĉiuj landoj. ■

# Memriproĉo

de **HUA XIA**

TIUN jaron mi estis 21-jara. Tiam mi laboris kiel instruisto en iu vilaĝa elementa lernejo ĉe montpiedo kaj ĉiutage kontaktiĝis kun petolemaj knaboj. En tiu jaro mi subite perdis la intereson por eduko de tiuj vilaĝaj infanoj pro forta atako de perdo de la amo de mia amatino.

En la someraj ferioj mi preparis la vojaĝon eksteren de la monto por min distri.

Kien? Mi ne sciis. Mi veturis per aŭtobuso aŭ trajno al tiu loko, kie la veturilo haltis. Tiel mi pasigis miajn feriojn.

Hejme miaj gepatroj atendis min kun bongustaj manĝaĵoj, sed vane.

En la unuaj tagoj ili opiniis, ke mi donas helpajn lecionojn en la lernejo. Dek tagoj pasis. Ili maltrankviliĝis. Mia patro serĉis min en la lernejo, sed mi ne estis tie. Iu diris al li, ke mi foriris kun pakaĵo komence de la ferioj, kien oni ne scias. Je tio mia patro ektimis.



En la sekvanta tago mia maljuna patro veturis per malnova biciklaĉo por viziti ĉiujn miajn kunlernantojn loĝantajn en diversaj vilaĝoj de la gubernio kaj peti informon pri mi, sed li vane klopodis. Neniu el ili sciis, kie mi estas.

Ĉiutage mia patro obstine biciklis 30 km al la lernejo por vidi, ĉu mi revenis.

Iutage, kiam li estis survoje, subite pluvegis. Li tramalsekiĝis. Sed post ununokta forta febro li pene ellitiĝis kaj denove iris al la lernejo por informiĝi pri sia filo.

Mia patro ne havis informon pri mi kaj mia patrino sonĝis ĉiunokte, ke min trafis katastrofo. Antaŭe ili ne estis superstiĉaj, sed nun ili eĉ invitis al la hejmo blindan sortodiveniston, kiu diris, kalkulante per la fingroj: "Via filo estas je ĉ. 20 km. nordoriente, iru serĉi!"

Aŭdinte tion, mia patro ekĝojis kaj biciklis rekte al la nordoriento je 20 km. fore. Atinginte la lokon, mia patro tuj stuporiĝis. Tie etendiĝas vasta akvokonservejo! Li foje-refoje rondiris ĉirkaŭ la akvokonservejo por trovi ion lasitan de mi sur la bordo, sed li nenion vidis krom la akvo.

40 tagoj pasis. Antaŭ la fino de la someraj ferioj mi revenis hejmen, forĵetinte la malĝojon kaj ĉagrenon al la ekstera mondo.

Kiam mi eniris en la domon, mia patrino stuporiĝis, kvazaŭ ŝi ne konus min, kaj post tio ŝi ŝanceliĝe sin ĵetis al mi. Kaj mia patro kolere insultis kaj volis bati min, tamen ne falis la bastono en lia mano super mia kapo. Momenton poste, li subite etendis siajn dikajn manojn kaj brakumis mian kapon. Li diris plorante: "Mia kara, finfine vi revenis!"

Tio okazis antaŭ sep jaroj. Dum tiuj sep jaroj mi ĉiam riproĉis min mem. Tamen mi estas tre feliĉa, ĉar en la mondo estas homoj, kiuj sincere amas min. Tiu sincera amo donis al mi kuraĝon venki ĉiajn malfacilojn kaj vivi kun firma volo. ■

**KOREKTO**

Anstataŭ 426 236 legu 46 236, 20-a linio de malsupre, dekstra kolumno, p. 50, junia numero.

**La Red.**

# Naŭdrakaj ekranmuroj en Ĉinio

Teksto de **LAN SHAN** Fotoj de **JAN JIN** kaj **LI QIANG**

EKRANMURO estas grava konsistiga parto de la antikvaj konstruaĵoj en Ĉinio. Kiel ekrano, ĝi staras antaŭ la enirejo de la konstruaĵo kun vasta spaco antaŭ ĝi, kio pliigas la imponecon de la konstruaĵaro. Ekranmuro ne nur estas ornamaĵo de konstruaĵo, sed ankaŭ servas por timigi demonojn kaj diablojn. Ĝiaj grandeco kaj beleco montras ankaŭ la rangon de la mastro de la konstruaĵo.

Inter la ekranmuroj tiu kun drakoj simbolas la konstruaĵojn de imperiestra familio. Estas ekranmuroj unudraka, tridraka, kvindraka kaj naŭdraka. Inter ili la naŭdraka estas la plej grandioza. La sankta kaj majesta drak-ekranmuro estas masonita el koloraj glazuraj brikoj kaj tegoloj. En Ĉinio bone konserviĝas tri naŭdrakaj ekranmuroj. Unu el ili estas en Datong, Shanxi (Ŝanŝji)-provinco, kaj la aliaj en Pekino.

## LA NAŨDRAKA EKRANMURO EN DATONG

Ĝi staras sur la strato Dongdajie (Dongdaĝje), proksime de la kampanilo de Datong. Ĝi estis konstruita en 1392 kaj servis kiel la ekranmuro antaŭ la loĝejo de la 13-a filo de Zhu Yuanzhang (Ĝu Jŭanĝang), la unua imperiestro de Ming-dinastio (1368-1644). Ĝi estas la plej frue konstruita kaj plej granda el la tri naŭdrakaj ekranmuroj.

Sur la norda flanko de la Naŭdraka Ekranmuro en Datong estas inkrustitaj naŭ drakoj. Ĝi longas 45.5 metrojn, altas 8 metrojn kaj dikas 2.02 metrojn. Malsupre de ĝi estas ĝia soklo. En la mezo estas skulptitaj diverspozaj leono, tigro, elefanto, sŭan-o (rabobesto en ĉina mito), ĉjilin-o (bonaŭgura besto en ĉina mito), fluganta ĉevalo k.a. La supron konsistigas tegmento el glazuraj tegoloj, imite al tiu de ligna strukturo. Sur la firsto skulptiĝas lotusfloroj kaj naĝantaj drakoj. Sur la ekranmuro vidiĝas naŭ gigantaj drakoj masonitaj el ses tavoloj da glazuraj brikoj. Ili naĝas en nubmaro. La konstruaĵo altiras vizitantojn per sia antikveco kaj originaleco.

La flava drako ĉe la mezo de la ekranmuro rigardas rekte antaŭen, kun korpo supren kaj vosto malantaŭen. La aliaj ok drakoj prenas diversajn pozojn: iu etendas siajn ungojn por kapti globon, alia etendas siajn tentaklojn por karesi nubojn, tria levas sian kapon en nebulo, kvara levas sian voston, kvina estas flugonta...

La plej altira karakterizaĵo de la Naŭdraka Ekranmuro en Datong estas, ke antaŭ ĝi estas rivereto, blankmarmora balustrado kaj du arkaj pontetoj. La akvo spegulas la naŭ drakojn. Kiam leviĝas ondetoj en venteto, aperas spektaklo, ke la naŭ drakoj ŝajne naĝas en la akvo.

## LA NAŨDRAKA EKRANMURO EN BEIHAI-PARKO

Ĝi, en la imperiestra ĝardeno Beihai de Pekino, konstruiĝis en 1756. Ĝi larĝas 25.86 metrojn, altas 6.64 metrojn kaj dikas 1.2 metrojn. El la tri naŭdrakaj ekranmuroj ĝi estas la unika kun du flankoj, sur kiuj skulptiĝas drakoj.

Estas originalaj la pozoj kaj stiloj de la drakoj en Beihai. Sur la ekranmuro drakoj ludas globon unuope aŭ duope. La drakoj ambaŭflanke de la ĉefa drako estas simetriaj en koloro. La draka korpo estas skulptita en alta reliefo, tial ĝi donas tre fortan impreson.

La bazo de la ekranmuro estas konstruita el bluablanka marmoro. Sur la bazo estas soklo farita el verdaj brikoj. La supro de la ekranmuro aspektas kiel tiu de palaco. Sur la flava firsto flugas naŭ verdaj drakoj. Ĉiu tegolo ĉe tegmentrando surhavas draketon. Sur la ekranmuro estas pli ol 640 drakoj. Ĉar tiu Naŭdraka Ekranmuro estas duflanka, ĝiaj orienta kaj okcidenta flankoj estas ornamitaj per glazuraj skulptaĵoj. Sur la orienta flanko estas la leviĝanta suno kaj sur la okcidenta la brilanta luno super rivero, maro kaj moviĝanta nubaro. La tuta ekranmuro estas konstruita el 424 sepkoloraj brikoj.


## LA NAŨDRAKA EKRANMURO EN LA IMPERIESTRA PALACO

Ĝi staras ekster la suda pordego de Huangji-(Hŭanĝji)-halo de Ningshou-halo, en la orienta parto de la Imperiestra Palaco de Pekino. Inter tiu ekranmuro kaj Huangji-pordego estas la antaŭkorto de Ningshou-palaco. Antaŭe la korteganoj ordigis tie siajn vestojn kaj mem cerbumis, kion ili devos fari, antaŭ la eniro en la halon laŭ ordono de imperiestro.

Imperiestro Qianlong (Ĉjanlong) de Qing-dinastio (1644-1911) deziris komforte pasigi sian maljunecon, post kiam li memvole detroniĝos kaj cedos la tronon



Parto de la Naŭdraka Ekranmuro en la Imperiestra Palaco de Pekino



La Naŭdraka Ekranmuro en Beihai-parko

La Naŭdraka Ekranmuro en Datong



al sia filo. En 1722, kiam li estis 62-jara, li konstruigis Ningshou-halon kaj Huangji-halon. Li tre ŝatis la Naŭdrakan Ekranmuron en Beihai-parko, tial li ordonis konstrui naŭdrakan ekranmuron antaŭ Huangji-pordego, imitante la Naŭdrakan ekranmuron en la parko.

Tiu Naŭdraka Ekranmuro staras sude de Huangji-pordego kaj la drakhava flanko frontas al la pordego. Kvankam ĝi estas imitaĵo de la ekranmuro en Beihai-parko, tamen ĝi disvolviĝis en arkitektura proporcio kaj arta formo. Por adapti la ekranmuron al la vasteco de la korto de Ningshou-halo kaj faciligi rigardadon de ĝi en Huangji-halo, la projektintoj malgrandigis ĝian alton kaj grandigis ĝian longon. Sekve, ĝi longas 29.4 metrojn kaj altas 3.5 metrojn. Ĝi konsistas el soklo, ĉefa parto kaj supro. La soklo estas skulptita sur blanka marmoro, kiu des pli reliefigas la drak-ekranmuron. La diferenco inter ĝi kaj la aliaj du estas, ke ĝi estas pli svelta, pli delikata kaj pli ĉarma.

# Kleriga kongreso

Teksto de **DAI SONG'EN** Fotoj de EPĈ-raportisto

KIAM mi regustumis hejme ĉiujn kolektitajn informojn kaj miajn notojn pri la 78-a Universala Kongreso de Esperanto en Valencio, al kiu aliĝis 1 863 personoj el 65 landoj, reaperis antaŭ mi ĉiuj kongresaj scenoj, kiujn mi sukcesis ĉeesti. Jen kelkaj fragmentoj, kiuj faris sur min fortan impreson.

## PENSIGA KONGRESA TEMO

Sojle de la nova jarmilo, kiam la plej ĉefaj problemoj de la mondo restas ankoraŭ paco kaj evoluo, la elekto de la kongresa temo "Klerigo por la 21-a jarcento" estas tre aplaŭda.

Sub la majstra reĝisorado de prof. d-ro Duncan Charters (Usono), la diskutoj pri la kongresa temo iris ne nur vigle kaj pensige, sed ankaŭ brile kaj sukcese.

Oni dediĉis plej longan tempon al la diskutoj en malgrandaj laborgrupoj pri diversaj subtemoj.

Min tre interesis la diskutoj pri pacedukado, ĉar kiam en la mondo ankoraŭ ekzistas diversaj malpacaj faktoroj, tre gravas la konsciiĝo kaj konsciigo pri la nepra neceso, ke la homoj lernu kunvivi pace kaj harmonie en unu granda rondo familia.

Post la diskutoj la laborgrupo de pacedukado rekomendis, ke vi traktu aliajn kiel vi deziras, ke aliaj traktu vin. Por tio necesas ne nur interhoma kaj interkultura komunikado, sed ankaŭ la konscio, ke la kompreno pri aliaj kulturoj, malsamaj kutimoj kaj sentoj ne venas nur pro komuna lingvo, kaj nemalhaveblas ankaŭ por la esperantistoj la bezono de specifa interkultura trejnado por scii, kiel rilati al aliaj personoj, kiuj apartenas al malsamaj kulturoj kaj havas malsimilajn valorsistemojn. Mi pensas, ke la mondo havos eternan pacon, se ĉiuj homoj sur la terglobo tiel agos.

Neignoreblas ankaŭ la rolo de Esperanto en la klerigado por la nova jarcento, la rolo, kiun nia Esperanto-komunumo devas esti preta preni inter la plej progresemaj ideoj kaj agadplanoj por la estonteco. La diskutoj kondukas al konkludo, ke ni, esperantistoj, devas subteni niajn proprajn organizaĵojn, kiuj kuraĝigas fakan agadon kaj klerigadon pere de Esperanto, kaj ke ni devas turni nin eksteren por partopreni kun aliaj individuoj kaj organizaĵoj, kiuj iniciatas kaj prilaboras tiujn klerigajn demandojn kaj tendencojn, kiuj maturigos la cirkonstancojn favore al serioza, senantaŭjuĝa konsidero de la solvo, kiun post jarcento da elproviĝo pretas proponi Esperanto. Sekve, al la novaj lernantoj de Esperanto, ne sufiĉas instrui nur la lingvon mem, sed ankaŭ necesas konsciigi pri la gravaj problemoj de la homa socio, kiujn ili alfrontos en la nova jarcento. Gravas ankaŭ konscii, ke ni ankoraŭ ne plene solvis la problemojn de la homa socio en nia propra komunumo, kiu tamen havas la deziron, sindediĉon kaj kapablon por pluevoluigi sin, por montri al la mondo modelon, kiu evidentiĝos ĉiam pli alloga, racia kaj necesa por kontentigi la bezonojn de nia socio en nova jarcento.

## AMO AL "EL POPOLA ĈINIO"

En la lastaj jaroj la kunsido de legantoj de "El Popola Ĉinio" jam iĝis tradicia ero de la kongresa programo, kaj ĉi-foje en Valencio ĝi okazis antaŭtagmeze de la 26-a de julio en la salono Grabowski en la Instruista Lernejo. Malgraŭ la distanco inter la ĉefa hejmo de la kongreso kaj la nomita lernejo trairenda sub la ŝvitloga suno, al la kunsido ĉeestis dekoj da personoj.

La kunsidon prezidis s-ro Zou Guoxiang (Zoŭ Gŭoŝjang), vicĉefredaktoro de EPĈ kaj ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo. En la enkonduko li antaŭ ĉio dankis kaj salutis ne nur la ĉeestantojn, sed ankaŭ ĉiujn legantojn kaj perantojn de EPĈ, kiuj ne povis veni al la kongreso, pro iliaj konstantaj abonoj kaj abonigoj, pro ilia pacienca kaj senlaca perado, pro iliaj subteno, helpo kaj kunlaboro diversmanieraj. Li emfazis, ke tio estas la vivanta forto, dank' al kiu EPĈ povas daŭre ekzisti kaj ĉiam pliboniĝi.

Li ankaŭ konigis la aktualan situacion de EPĈ kaj aparte menciis, ke de la lastaj du jaroj draste malkreskis la nombro de abonantoj pro la grandaj ŝanĝiĝoj en Orienta Eŭropo, en eks-Sovetunio kaj eks-Jugoslavio. Por ebligi al esperantistoj en tiuj landoj daŭre legi EPĈ, la redakcio establis Fondaĵon EPĈ-Abono. Per mondonaco oni ne nur subtenas la Esperanto-movadon en tiuj landoj, sed ankaŭ helpas la daŭran ekziston de EPĈ.

De nia vicĉefredaktoro la ĉeestantoj kun granda ĝojo kaj kontento informiĝis, ke ekde la jaro 1994, anstataŭ la Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio, la redakcio de EPĈ mem okupiĝos pri distribuado de la revuo kaj eldonaĵoj en Esperan-

# en suna urbo

to. La nova tasko signifas novajn klopodojn, kaj ni pretas fari nian eblon kaj ankaŭ petas helpon kaj kunlaboron de niaj perantoj kaj legantoj per malavara prezentado de ideoj kaj konsiloj, per daŭra fervora perado, per regulaj abonoj.

Sekvis vigla interŝanĝo de opinioj. Oni substrekis la gravecon de la daŭra ekzisto de EPĈ, montrante, ke EPĈ estas la revuo en Esperantujo, kiun oni povas fiere montri al la neesperantista publiko. Por varbi pli da abonantoj, necesas ne nur havi pli da interesaj temoj pri la kulturo, historio kaj popola vivo de Ĉinio kaj aperigi pli da informoj el aliaj landoj, sed ankaŭ redukti eldonajn kostojn, fiksi moderan abonprezon kaj uzi diversajn rimedojn por kuraĝigi la perantojn kaj abonantojn. Iuj proponis repraktiki la sistemon de trijara abono, aliaj sugestis, ke kursgvidantoj prenu EPĈ kiel lernolibron, kaj triaj konsilis, ke EPĈ kunlaboru kun aliaj Esperanto-revuoj en interŝanĝo de anoncoj. Iu eĉ inspiris ĉinajn samideanojn, kiuj uzas ĉiutage kunmetitajn vortojn en sia gepatra lingvo, enkonduki novajn vortojn en Esperanton por kontribui al la evoluo de Esperanto.

Aŭskultante ilin, mi estis ege kortuŝita de la amo kaj entuziasmo de niaj legantoj por EPĈ.

Fakte tiajn amon kaj entuziasmon ni povis percepti ankaŭ dum la tuta kongresa semajno. Preskaŭ ĉiuj renkontitaj legantoj montris sin fieraj pri la abono, kaj mi neniam forgesos la grandan ĝojon kaj fieran mienon de germana samideano Adolf Burkhardt, kiu sciigis al mi, ke li posedas la kompletan kolekton de EPĈ ekde ĝia unua numero.

En la okuloj de redaktoro de revuo, ĉiu aperonta numero estas bebo, kaj mi tutcertas, ke ĉiuj stabanoj de EPĈ pretas nutri kaj flegi ĉiujn estontajn bebojn kiel eble plej bone, por ne vanigi la amon kaj entuziasmon de niaj legantoj.

Ni aparte ĝojis havi la okazon renkontiĝi kun niaj geamikoj s-ro José Ivern kaj lia edzino en Barcelono kaj kun nia peranto Félix Gómez en Madrido. Dank' al ilia gastamo ni povis iom koni la du metropolojn kaj ties Esperanto-movadon. La tagoj, kiujn ni agrable pasigis kune kun ili, estas vere neforgeseblaj.

Al ges-roj Ivern, s-ro Gómez kaj ĉiuj legantoj renkontitaj en Valencio mi ŝatus diri: Koran dankon pro ĉio farita por EPĈ! Ĝis revido iam en Ĉinio aŭ en Esperantujo!

## PAELJO KAJ FLORBATALO

Unu el la celoj de nia Universala Kongreso estas konigi al la partoprenantoj la popolon kaj kulturon de la kongresa lando kaj urbo. Ĉi-rilate la Valencia LKK brile sukcesis.


Vespere de la 24-a de julio LKK aranĝis specifan Interkonan Vesperon kun la valencia inventaĵo — paeljo por ĉiuj partoprenantoj. Ĝi okazis sur la plaĝo Sunset ĉe Mediteraneo. Post alveno al la plaĝo mi estis surprizita de giganta pato el ŝtalo, kun diametro de kvar metroj kaj pezo de 1 000 kilogramoj. La paeljo, kiun manĝis pli ol 1 500 kongresanoj, estis kuirita en tiu pato. Laŭinforme, por la fajro estis konsumitaj 600 kilogramoj da oranĝarba ligno, kaj la ingrediencoj konsistas el rizo, kokidaĵo, anasaĵo, kuniklaĵo, helikoj el la montaro, tomato, specialaj verdaĵoj, papriko, natura safrano, olivoleo, salo kaj akvo. Estas nekredeble, ke la paeljo sufiĉa por 2 000 personoj estis pretigita nur post unu kaj duona horoj. Ĉiu ricevis sufiĉan kvanton da paeljo kaj raran memoraĵon ligna kulerego kun la simbolo de la kongreso, per kiu oni tradicie manĝas la paeljon.

En la solena inaŭguro en la sekvanta tago la prezidanto de UEA prof. d-ro John Wells diris interalie: "Per nur unu aŭ du ingrediencoj oni ne ricevas bonan paeljon. Necesas kombini harmonie multajn diversajn elementojn por fari harmonian tuton. Simile pri nia idealo." Per la metaforo de la paeljo la prezidanto figure komprenigis, ke por atingi la finan venkon de Esperanto, ne sufiĉas esperantistoj de unu aŭ du landoj, necesas ke amasego da esperantistoj el ĉiuj landoj de la mondo troviĝu kune en harmonia tuto kaj solidarece kunlaboru. Kiel esperantisto de evoluanta lando, mi opinias aparte grava ankaŭ tion, ke Esperanto devas esti posedata kaj uzata de ĉiam pli da personoj en la tria mondo, kies loĝantaro okupas plejparton de la monda loĝantaro.

Dum la kongreso ni konatiĝis ankaŭ kun la valencia florbatalo en enormaj kvantoj.

En la vespero de dimanĉo (la 25-a de julio), kiu estas tradicie rezervita por la Nacia Vespero, kongresanoj estis invititaj aliĝi al la amasoj sur la stratoj de Valencio, proksimaj al la kongresejo, por vidi la memorindan spektaklon de la valencia florbatalo.

Surstrate parade rivalis rozario da ĉaroj, pompe kaj lukse aranĝitaj per abundo da buntaj floroj. Rikoltis varmajn aplaŭdadojn ĉiu ĉaro




Kongresanoj

En la florbatalo



kondukata de belaj junulinoj en riĉaj tradiciaj vestoj. Min mirigis, ke troviĝis ankaŭ ĉaroj aranĝitaj en formo de ĉinaj pavilonoj kaj budhismaj temploj. Kiam aperis la premiitaj ĉaroj, min subite atakis diantoj de malantaŭe. Mi returniĝis kaj rimarkis, ke miaj geamikoj ges-roj William kaj Luci Harmon el Usono kaj ges-roj Yosimi kaj Secuko Umeda el Japanio komencis florbatali kontraŭ mi kaj miaj gekolegoj. La ĉina teamo tuj reciprokis per dianto-kugloj. Tiel okazis tre gaja kaj emocia florbatalo inter kongresanoj kaj nekongresanoj, inter konatoj kaj nekonatoj, kun akompano de populara muziko ludata de dekoj da valenciaj orkestroj. Ni ĉiuj revenis de la batalkampo kun florĝardeneto surkape. La floroj ja bezonas akvon, kaj ĉu ni havu akvobatalon venontjare en Seulo ĉe la malsupra baseno de la rivero Han? Oni esperas ion specifan, korean aŭ seulan ankaŭ en Seulo, se ne akvobatalon. ■





Kongresanoj diskutas pri la temo de paco.


Paeljo preparata



Esperantistoj de EPĈ-redakcio gastas ĉe ĝia peranto F. Gómez (la tria de maldekstre).



## ESP-NOVAĴOJ




Poŝtstampoj pri la 1-a Orient-Azia Sportkunveno kaj patriotaj demokratoj de P.R. Ĉinio

*Ni bonvenigas Esperantajn artikolojn, Esp-novaĵojn kaj fotojn de ĉiu ajn Esperanta organizo aŭ individuo. Bonvolu sendi kontribuaĵon al s-ro Wang Hanping, El Popola Ĉinio, P.O. Kesto 77, Pekino, 100037, Ĉinio.*

**La Red.**

● La Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisiis la poŝtmarkoseriojn "La 1-a Orient-Azia Sportkunveno" kaj "La Patriotaj Demokratoj de P.R. Ĉinio" respektive en la 9-a kaj la 15-a de majo 1993. En la samaj tagoj la Haikou-a Poŝtmarka Kompanio de Hainan-provinco uzis poŝtstampilojn en Esperanto kaj la ĉina lingvo, kies projektinto estas s-ano Zhang Linrui (Ĝang Linĵuj).

● Februare de 1992 en Meksiko okazis internacia libro-foiro. Meksikaj esperantistoj utiligis ĉinan servotablon por propagandi Esperanton kaj vendi Esperantajn librojn.

● Pola Radio aŭdigas siajn Esperanto-elsendojn ĉiutage ekde la 4-a de aprilo 1959. Nun estas du elsendoj: (Laŭ la nuna mezeŭropa tempo)

15:30 h

| | | | |
|---|---|---|---|
| 31.50 | 41.99 | 49.22 | 200 m |
| 9525 | 7145 | 6095 | 1503 kHz |

22:30 h

| | | | |
|---|---|---|---|
| 41.18 | 41.27 | 49.22 | 200 m |
| 7285 | 7270 | 6095 | 1503 kHz |

La Esperanto-Redakcio okupas la duan lokon de kvantoj de ricevitaj korespondaĵoj de eksterlanda programo de Pola Radio en majo. (la unua loko: Germana Redakcio — 202, kaj la dua loko: Esperanto-Redakcio — 155) Kaj post la unuaj kvin monatoj tiu redakcio plue okupas la duan lokon. Esperanto-Redakcio de Pola Radio bonvenigas la aŭskultantojn partopreni en la programo "Koncerto kun bondeziroj". Detalajn informojn petu de Pola Radio, Esperanto-Redakcio, PL-00-950 Varsovio, Box 46, Pollando.

● La duobla aŭtuna numero de "Heroldo de Esperanto", kun detala ilustrita raporto pri la Universala Kongreso en Valencio, estos ekspedata senpage al ĉiu, kiu petos ĝin per simpla poŝtkarto al la redakcio de "Heroldo de Esperanto", Via Sandre 15, 1-10078 Venaria Reale, Torino, Italio.

● Kroata Esperantista Unuiĝo (KEU) dum la lernojaro 1992/1993 organizis E-kursojn en pluraj lokoj. En Zagrebo, kursoj estis organizitaj en kvar bazlernejoj kun entute 78 gelernantoj, KEU organizis ankaŭ E-ludejon por la infanoj en la aĝo 5 ĝis 9 jaroj kaj du E-kursojn por mezlernejanoj kaj iam pliaĝuloj, en kiu partoprenis dudeko da kursanoj. En la ĉelima urbo Koprivnica E-vivo reaktiviĝis, deko da gelernantoj sekvis la E-kurson. Nun ili jam komencis preparon por la venonta lernojaro.

● S-ro Aleksandro Salnikov el Ukrainio intencas perlabori monon por aboni EPĈ per sendado de diversaj reklamiloj de alilandaj firmaoj en Ukrainio, landoj de eks-USSR, Eŭropo, Azio... Dank' al la diferenco en kurzo de ukrainia mono al USD, li povas per 1 USD dissendi 750 leterojn en Ukrainio, aŭ 187 al ekssovetiaj landoj, aŭ 43 al Eŭropo, aŭ 31 al aliaj kontinentoj. La firmaoj sendu al li konvenan kvanton de reklamiloj por dissendado kaj duonon de koncerna mono al li, duonon al redakcio de EPĈ (ekzemple po 26 USD). Tio estos tre profitodona al alilandaj firmaoj, ĉar per 1 USD ili povas sendi nur unu reklamleteron. La adreso: Aleksandro Salnikov, P.O. Box 5, Staĥanov, Luganskaja obl. UA-349700, Ukrainio.

● En Rumanio s-ino I. Szucs, prezidanto de Esperanto-Asocio Oradea, sukcese gvidis la E-kurson por progresintoj kun 24 partoprenantoj. La kurso finiĝis la 22-an de junio.

Ĉinaj libroj eksponataj en la Internacia Libro-foiro en Meksiko



Membroj de E-kurso en Rumanio





Stando ĉe rivereto

SUR STRATOJ

# La akvoriĉa urbo Shaoxing

Teksto kaj fotoj de **LIU SIGONG**


ANTAŬ longe mi aŭdis, ke la akvoriĉa urbo Shaoxing (Ŝaŭŝing) estas tre bela. Vizitante la urbon, mi vere kortuŝiĝis pro la distingiĝa pejzaĝo: pontetoj super riveretoj kaj vico post vico da loĝdomoj ĉe la akvo.

Laŭdire, en Shaoxing la totala longo de la riveroj atingos 2 000 kilometrojn. La riveroj, lagetoj kaj kanaloj, araneaĵe kruciĝantaj, interkomunikigas ĉiujn vilaĝojn. Inter verdaj arboj kaj bambuoj vidiĝas loĝdomoj kun griza muro kaj nigrategola tegmento. Sur la riveretoj kaj sub ŝtonaj arkpontoj navetas boatoj kun nigra ŝirmilo. Kia ĉarma pejzaĝo! Mi tuj kaptis la scenojn per mia fotilo.

Mi vizitis ankaŭ la urbeton Anchang, 20 kilometrojn for de Shaoxing, kiu havas historion de 1 100 jaroj. Anchang karakteriziĝas per 1 600-metra ŝtonplata strateto ĉe la rivero. La strato direktiĝas de oriente okcidenten. Ambaŭflanke de ĝi estas malnovaj tetrinkejoj, restoracioj kaj butikoj. La loĝdomoj situas ĉe riverbordo. Sur la bordo estas ŝtona ŝtuparo, ĉe kiu boato ankriĝas kaj oni lavas vestojn.

Kiam venas festotago aŭ foirtago, la strato fariĝas movoplena. Frumatene, proksimaj vilaĝanoj veturigas tien boatojn ŝarĝitajn per fiŝoj, salikokoj, legomoj kaj aliaj lokaj produktoj. Jen aperas bazaro.


Mi promenis sur la strato kaj partoprenis en la homamaso. Mi vidis, ke inter la vendistoj estas ne nur lokanoj, sed ankaŭ alilokanoj, kiaj ujguroj kun ĉapelo sur la kapo kaj tibetanoj portantaj longajn botojn. Mi foje kaj refoje levis mian fotilon antaŭ la scenoj. ■




Strateto en la akvoriĉa urbo

Vendejo de vestoj









En matena foiro

Ŝtona ŝtuparo kondukanta al strateto



Vendanto kaj aĉetanto sur strato



# Verdaj marbordoj

Teksto de **JI PING** Fotoj de **SUN ZHIJIANG**

ĈINIO ĉiujare arbarizas ĉ. 38.6 milionojn da hektaroj da kampoj por konstrui marbordan kamposirman forsto-sistemon, unu el la grandaj ekologiaj konstruoj. Nun, 13 000-kilometra marbordo estas arbarizita. La arbarkovrita areo superis 6.7 milionojn da hektaroj. Leviĝas marborda verda Granda Muro. Ĝi estas harmonia kun la landinterna verda Granda Muro — plantado de kamposirmaj forstoj en nord-orienta, norda kaj nordokcidenta Ĉinio, la plej grandskala ekologia sistemo en la mondo.

Ĉinio havas 18 000 km da marborda linio, kiu komenciĝas de la enmariĝo de Yalu-rivero en Liaoning-provinco en la nordo kaj finiĝas per la enfluejo de Beilun-rivero de la Guangxi(Gŭangŝji)-a Ĝŭang-nacia Aŭtonoma Regiono en la sudo. Ĝi kunligas 159 guberniojn de 11 provincoj (krom Taiwan), aŭtonomaj regionoj kaj municipoj Liaoning, Hebei, Tianjin (Tjanĝin), Shandong, Jiangsu (Ĝjangsu), Ŝanhajo, Zhejiang (Ĝeĝjang), Fujian (Fuĝjan), Guangdong, Guangxi kaj Hainan. En la marbordaj regionoj, kiuj konsistigas 2.6% de la totala teritorio de Ĉinio, vivas 10% de la loĝantoj de la tuta lando, kiuj ĉiujare kreas produktovaloron de cent miliardoj da juanoj (5.7 juanoj egalas unu usonan dolaron).

Turistoj en arbaro ĉe maro



Tamen la loko ĉe maroj havas klimaton kaprican, tial ĝin ofte atakas tajfuno, ŝtormo, martajdo kaj superakvego, kiuj ĉiujare kaŭzas ekonomian perdon de ĉ. 3 miliardoj da juanoj.

Por plibonigi la ekologian medion, en la komenco de la 50-aj jaroj oni jam komencis konstrui kamposirmajn arbarojn en la marbordaj regionoj. Iuj provincoj kaj municipoj sinsekve fondis oficialajn administrejojn pri marborda kamposirma forstumado kaj teknik-gvidajn instituciojn, organizis teknikistojn por fari enketadon kaj projektadon pri marborda kamposirma forstumado kaj faris eksperimentojn por enkonduki novajn specojn de arboj. Post 1955 oni sukcesis planti pinojn (*Pinus Thunbergii*) sur plaĝo de la nordo kaj kasuarinon en malprofundaĵo de la sudo. Ĝis 1987 en la marbordaj regionoj oni plantis sume 4 267 000 hektarojn da arboj kamposirmaj, materialaj, ekonomiaj kaj porbrulaĵaj, samtempe oni faris kamposirman forstoreton sur 1 333 000 hektaroj da kampoj. Tamen malboniĝo de ekologia medio ne estis radikale bridita, ĉar tiam por marborda kamposirma forstumado ne estis ĝenerala projekto, la kulturitaj arboj ne povis retiĝi, nek zoniĝi, kaj plie mankis bona flegado. Pro grunda erozio detruiĝis pli ol 900 digoj de montaj cisternoj en la marbordaj regionoj de Fujian, la totala kvanto de ŝlimo superis 10 milionojn da kubmetroj. En la rivervojo de Fuzhou (Fuĝou) al Mawei-haveno ŝlimo altis je 76 cm dum 20 jaroj, sekve oni ĉiujare elspezis pli ol 10 milionojn da juanoj por dragi ŝlimon en Mawei-haveno, kies akvoprofundo laŭ projekto devis esti 10 m, sed nun ĝia akvoprofundo restis nur 7 m. En la 26 jaroj depost 1949 la areo de grunda erozio de Fujian estis pli ol 6 milionoj da hektaroj, furioza tajfuno ĉiujare alportis meznombre 9-foje katastrofojn, kio kaŭzis gravan ekonomian damaĝon. En 1986 tajfuno kvarfoje atakis Guangdong-provincon, kio kaŭzis damaĝon je 2 miliardoj da juanoj kaj inundis 533 333 hektarojn da kampoj.

Kontraŭ damaĝo de la naturo al la homaro, laŭ la ĉinaj marbordoj oni komencis grandskalan forstumadon. En 1988 la Ĉina Forstokultura Ministerio ellaboris grandiozan projekton por konstrui 3.56 milionojn da hektaroj da marbordaj kamposirmaj forstoj. La tasko plenumiĝos en du periodoj. De la 80-aj jaroj ĝis la fino de la 20-a jarcento estas la



Flegado de forsto

unua periodo, en kiu oni plenumos 7% de la tasko. En la lastaj 5 jaroj oni arbarizis ĉ. 1 933 mil hektarojn da kampoj, je 300% pli multe ol la arbarizita areo de la pasintaj 37 jaroj. Post plenumiĝo de la unuaperioda forstumado la marborda arbarkovrita areo kreskos de 25% al 39%.

En la 90-aj jaroj Ĉinio rapidigis sian arbarizadon en la ĉemaraj regionoj. Diversaj lokoj laŭ siaj kondiĉoj plantas pluruzajn kaj multspecajn arbarojn kontraŭventajn, kampoŝirmajn kaj akvokonservajn por konstrui lokan kampoŝirman forston en zonon, reton kaj parcelon.

En la lastaj jaroj aperis nova ŝanĝiĝo en marborda kampoŝirma forstumado. Unue, oni rapidigis la marbordan kampoŝirman forstumadon. En la pasintaj 3 jaroj por fari sian marbordan kampoŝirman forstumadon Fujian-provinco ĉiujare arbarizis ĉ. 66.7 mil hektarojn da kampoj, plantis pli ol 1 000 km da marbordaj arbaraj zonoj, 95% de la marbordo jam estas verdigitaj kaj la provinco fundamente plenumis sian taskon. Due, ellaboriĝis konstrua projekto. Surbaze de la ĝenerala projekto pri marborda kampoŝirma forstumado, ellaborita de la Ĉina Forstokultura Ministerio, la marbordaj provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj ellaboris sian propran planon koncerne la kampoŝirmajn forstojn, kaj tiel la sistema forstumado iom post iom suriris sciencan vojon. Trie, tridimensia ekspluato akiris novan progreson. Laŭ tridimensia forstumado, en Chaoyang-gubernio, Guandong-provinco, oni plantis 20 mil hektarojn da porlignaj kaj porbrulaĵaj arbaroj sur malproksimaj kaj altaj montoj; 10 mil hektarojn da ĉirkaŭmonta fruktarbara zono kun longo de 120 km sur proksimaj montoj kaj montdeklivoj. Ĉe riveroj kaj apud vojoj sur ebenaĵaj agrikulturaj regionoj ili kulturis bambuojn kaj kulturis bananujojn, liĉiarbojn kaj aliajn fruktarbojn; kulturis forston kampoŝirman sur la marborda plaĝo kaj oranĝarbojn interne de ĝi. Kvare, gravaj forstokulturaj teknikoj progresis. Oni atingis grandan progreson en forstokulturo ĉe trablovejoj, seriozaj alkalaj lokoj kaj rokmontoj, la forstumado disvolviĝas de la antaŭaj malpli ol dek hektaroj por unu parcelo al ĉ. 600 hektaroj. En la lastaj jaroj Fuqing (Fuĉing)-gubernio, Fujian-provinco, grandskale disvastigis forstumadon kaj plantidokulturadon en ujo sur rokmontoj, alkalaj lokoj, riverbuŝoj kaj trablovejoj kaj serioze eroziitaj lokoj. La postviva procentaĵo de la kulturitaj arboj superis 85%. La urbo Huanghua, Hebei-provinco, disvastigis plantadon de salikoj kaj ricevis bonajn ekologian kaj ekonomian efikojn.

Enketo far koncerna departemento de la ŝtato raportis, ke en la lokoj, kie rudimente formiĝis marborda kampoŝirma forstosistemo, katastrofoj reduktiĝis je 30-40%, en iuj lokoj je 50-60% kaj almenaŭ je 15-20%. Foje ventego atakis Rongcheng(Ĵongĉeng)-gubernion, Shandong-provinco. Rezulte, en la vilaĝoj, ŝirmitaj de forsto, domoj detruiĝis nur je 4%, sed en la vilaĝoj sen forsto domoj detruiĝis je 17.7%. Foje Shandong-duoninsulo suferis de 11-grada tajfuno, en la lokoj, ŝirmitaj de forsto, falis malpli ol 10% de la grenaj plantoj kaj 5% de la fruktoj falis de la arboj, sed en la lokoj neprotektataj de forstoj la damaĝo estis multe pli serioza.


Samtempe kun plibonigo de la ekologia medio, marbordaj lokoj plene utiligas sian geografian avantaĝon, grandskale disvolvas arbaran turismon, konstruis 30 novajn arbarajn parkojn, kio ne nur beligas la medion, sed ankaŭ donas bonajn ekonomian kaj socian efikojn.

Nun sur la ĉina marborda linio verdaj ekranoj interligiĝas peco kun peco, iuj kampoj konstruiĝis en kampoŝirma forstoreto kaj nemalmultaj vilaĝoj vidiĝas sur verdaj montoj kaj montdeklivoj. Iuj lokoj abundiĝis je fiŝoj kaj rizo aŭ ĉarmaj marbordaj arbaraj naturparkoj. Disvolviĝo de la marbordaj kampoŝirmaj forstoj ne nur efike plibonigis la ekologian medion de la marbordaj regionoj, akcelis iliajn agrikulturan produktadon kaj lokan ekonomion kaj forigis mankon de brulaĵoj al la amasoj, sed ankaŭ ludis gravan rolon por disvolvi turismajn riĉfontojn kaj akceli pordomalfermon de la marbordaj regionoj.

Laŭ la nuna rapideco, konstruado de 18 000-kilometra marborda kampoŝirma forsto plenumiĝos je 5 jaroj pli frue. Tiam, en vastaj marbordaj regionoj de Ĉinio etendiĝos kontinuaj arbaroj kaj prosperos la ekonomio. ■



Forsto ĉe maro



Ĉe marbordo

Insuleto verdigita




Sceno el Hŭangmej-opero

**XIAO GENG:**

# Pri operoj de Ĉinio

La ĉinaj operoj havas 2 000-jaran historion depost kiam naskiĝis la rakonta prezentado en la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K.- 25 p.K.) kaj havas pli-ol-800-jaran historion, kalkulate ekde Song- kaj Yuan-dinastioj (960-1368), kiam furoris sudaj operoj. Kiel reprezentantoj de la orientaj operoj, la ĉinaj tradiciaj operoj kaj la japanaj nooj, kabukoj k.a. portas grandan antikvecon kaj profundan tradicion. Sed nun ili iras malsamajn vojojn: Dank' al granda financa povo, la japana kabuko, kiel ŝtata trezoro, konserviĝas, dum la ĉinaj operoj, kiaj pekina opero kaj kunĝju-opero, disvolviĝas kaj perfektiĝas dank' al sia vivipovo.

## SPECOJ DE ĈINAJ OPEROJ

Kun pli ol 300 specoj de operoj, Ĉinio estas honorita kiel lando de operoj. Laŭ statistiko, ĉirkaŭ 200 el ili nun ankoraŭ viglas kaj la aliaj 100 preskaŭ malaperas aŭ prezentiĝas nur de amatoroj.

La ĉinaj operoj plejparte estas dividitaj per voĉo. En Ĉinio tre diferencaj dialektoj kaj malsamaj voĉoj kombiniĝas kaj formiĝis multaj operoj. La pekina opero, multe asimilinte fortaĵojn de lokaj operoj, estas plej ŝatata kaj plej influhava en Ĉinio. Ĝi estas ludata en la tuta lando.

Krom la pekina opero, en Ĉinio famas ankaŭ la operoj *pingĝju*, juĝju, jŭeĝju kaj *hŭangmej*.

Multaj ĉinoj amas operojn. Iuj eĉ povas iomete kanti sialokajn operojn. Ofte okazas, ke fragmento de opero kortuŝas aŭ interkomunikigas du fremdulojn. La ĉinaj operoj estas ligilo por harmoniigi la sentojn kaj spiriton de ĉinoj.

Krom pekina kaj aliaj lokaj operoj de han-nacio, Ĉinio, kiel multnacia lando, havas ankaŭ nacimal-

plimultajn operojn karakterizitajn per nacia lingvo kaj muziko, ekz. tibeta, ĝŭang-a, taj-a, baj-a kaj dong-a operoj. Tiuj operoj havas la komunan stilon de la lokaj, kaj plie, ili plaĉas al nacimalplimultanoj per siaj naciaj karakteroj.

## APARTAĴOJ DE ĈINAJ OPEROJ

La prezentado de ĉinaj operoj karakteriziĝas per lertaj kantado, recitado, gestado kaj luktado de aktoroj. Spektantoj ĝuas operon nur por aŭskulti la voĉojn, rigardi la kostumitajn aktorojn kaj lertan prezentadon kaj gustumi la etoson, sed ne por sperti la propran vivon. La dekoracio de opero estas simbola kaj ne reala, kaj ĝia amplekso estas spegulita per muziko, kantado kaj prezentado de aktoroj, ekz., la plena spaco sur la scenejo ĝenerale sentigas ekstreme vastan amplekson. Post kelkfoja klakado venas tagiĝo. La spektantoj neniam suspektas la prezentadon de fikciaj ĉieliro, enteriĝo, markirlado ktp. Jen kuŝas la ĉarmo de ĉinaj operoj. Ĝi ĉasas simbolon kaj ne formon. Tiu estetika principo liveras vastan spacon al la ĉinaj operoj, donas al la aktoroj sufiĉan liberon elmontri sian kapablon. Tiu simboleco estis uzata de Bertolt Brecht, germana majstro de la moderna opero, en liaj verkoj.

Formulo estas alia karakterizaĵo de la ĉinaj operoj.

Sceno el pekina opero



Oni normigas movojn en la vivo por ricevi el tio serion da movoj propraj al prezentado, kiaj pordofermado, fenestromalfermado, surĉevaliĝo kaj surboatiĝo, kaj havigis al si ankaŭ apartajn dancmovojn. Fakte, ne nur korpaj movoj, sed ankaŭ la scenaro, rolo, muziko, kanto kaj kostumo, ĉio ĉi estas nedisigebla de formulo. Formuligo prezentas ŝajne intiman rilaton inter la opero kaj vivo, t.e., la prezentado de la antaŭa originas de la lasta, sed pli alta kaj pli bela ol ĝi. La formula beleco estas la suko de la ĉinaj operoj. Sen ĝi damaĝiĝas esence la ĉinaj operoj.

## OPEROJ KAJ LUDARTOJ

La arto de ĉina opero iasence estas tiu de aktoro. La aktoro ĉiam estas sur la centro de agadoj de dramistoj, reĝisoroj, muzikistoj kaj dancistoj. Kiel enkorpiganto de diversaj artaj projektoj kaj manieroj, kun evidentaj fortaĵoj li partoprenas en prezentado, tial oni diras: "Ne disigeblas aktoroj kaj operoj." Ĝuante operon, la spektantoj senescepte turnas sian atenton al la superba lerteco de aktoroj. Tiu tradicia ĉarmo distingas la ĉinajn operojn disde alispecaj operoj en la mondo. Eble ĝuste pro tio historiaj libroj pri ĉinaj operoj konigas multe da eminentaj aktoroj. Opera trupo, se ĝi deziras gajni al si spektantojn, nepre devas havi siajn elstarajn aktorojn.

Ankaŭ la disvolviĝo de la modernaj ĉinaj operoj pruvis la decidan rolon de aktoroj en prosperado de operoj. Kiu opero posedas eminentajn aktorojn, tiu prosperas. En la 40-aj jaroj, en Ŝanhajo majstro Mei Lanfang prezentis la operon "Sonĝo en Ĝardeno", kio fascinis la tutan urbon. En la nigra merkato unu operobileto kostis unu taelon da oro. La nomo Mei Lanfang brilis proksimume duonjarcenton. La tempo, kiam aktoris la majstro, estis la plej brila epoko de la pekina opero.

La Hebei-a *bangzi*-opero furoris en la komenco de ĉi jarcento kaj velkis je la fino de la 40-aj jaroj. En la pasintaj jaroj, dank' al la penado de aktorino Pei Yanling, tiu operspeco refoje ekbrilis. En 1985 per siaj solidaj ludartoj ŝi prezentis la operon "Fuĝo en nokto", kiu poste prezentiĝis ankaŭ en Japanio, Danlando, Svedio, Brazilo kaj Grekio.

## NE PEREOS LA ĈINAJ OPEROJ

Same kiel aliaj klasikaj artoj de la mondo, ankaŭ la ĉinaj operoj alfrontas la demandon: Ĉu vivi plue? Nepre necesas reformi ĉinajn operojn, sed la reformado devas baziĝi sur la rekonado pri la tradicio. La renovigitaj operoj devos diferenci de la tradiciaj kaj samtempe ne ellasi ilian estetikan spiriton. Estas spektantoj kaj operaj artistoj, kiuj havas la rajton decidi la estontecon de ĉinaj operoj. Eble iu operspeco malprosperos kaj eĉ pereos, tamen la ĉinaj operoj, konsistiga parto de la ĉina nacia kulturo, vivos por eterne. ■

# La Antikva Scenejo en Tianjin



La Antikva Scenejo
Foto de **ZHANG SHUDE**


La nomita scenejo estis kant-danca scenejo, la ĉefkonstruaĵo de gildo farita en 1907. Kiel elstarigita scenejo, ĝi havas neniun kolonon. Super ĝi estas kaĝosimila konstruaĵo kun koloraj desegnaĵoj. La scenejo estas racie projektita kaj sen laŭtparolilo la spektatoroj povas bone aŭskulti la aktorojn.

La Antikva Scenejo nun funkcias kiel la Teatra Muzeo de Tianjin (Tjanĝin), la unua tiaspeca muzeo de Ĉinio. Tie eksponiĝas multaj valoraj teatraj materialoj, kaj ankaŭ okazas prezentado en tradicia stilo.




Prezentado de pekina opero sur la scenejo Foto de **ZHANG SHUDE**

Spektantoj ĝuas teon kaj frandaĵon.
Foto de **ZOU QIKUI**





Ekster la teatro Foto de **YU QUANXING**

## ZHONGGUANCUN, DISTRIKTO DE ALTAJ SCIENCOJ KAJ TEKNIKOJ EN PEKINO

Zhongguancun (Ĝonggŭancun) estas malvasta, tamen tre fama eksperimenta distrikto de disvolvo de novteknikaj industrioj en Pekino. Tie funkcias pli ol 2 800 entreprenoj de novaj teknikoj.

La ĉefaj normoj de profito de la distrikto kreskis je 30 procentoj ĉiujare. En 1992, kompare kun la elektronika strato antaŭ 5 jaroj (pri tiu strato ni raportis en la 8-a numero de 1988, sub la titolo "Elektronika Strato de Ĝonggŭancun"), la totala enspezo de tekniko, industrio kaj komerco de la distrikto kreskis 7-oble kaj la produktovaloro de industria vendado 20-oble. En la lasta jaro la totala enspezo de tekniko, industrio kaj komerco de ĉiu el la dek avangardaj entreprenoj de la distrikto superis cent milionojn da juanoj.

Alta profito devenas de alta plusvaloro de produktaĵoj de novaj altaj teknikoj. Sin apogante sur la intelekta supereco de la 55 superaj lernejoj kaj cent scienc-esploraj institutoj, la distrikto jam materiigis 3 000 fruktojn de scienca esplorado kaj 1 300 el ili estas produktataj certakvante.

La tieaj scienc-teknikaj entreprenistoj estas kaj posedantoj de fruktoj de scienca esplorado kaj vendantoj de scienc-teknikaj produktaĵoj kaj administrantoj de sia entrepreno. Ĉe sia naskiĝo la altteknikaj entreprenoj jam submetiĝis al la senpera kontrolo de la merkato kaj funkcias laŭ la merkata leĝo en la flankoj de difino de specoj de produktaĵoj, investo, produktado kaj vendado.

Ĝenerale la distriktoj de altaj sciencoj kaj teknikoj de la mondo havas tri trajtojn de disvolviĝo: de disa administrado de entreprenoj al administrado de grupigitaj kompanioj; de enkonduko de plej avangarda eksterlanda tekniko al disvolvo de sia propra produktaĵo de altaj sciencoj kaj teknikoj kaj oferto en la internacia merkato; kaj de teknik-komerca entreprenado al produktado de teknikaj industriaĵoj kaj al unuiĝo de scienco, industrio kaj komerco. La entreprenoj en Zhongguancun estas evoluantaj al grupo-unuiĝo. En tio la kompanioj (grupoj) Stone kaj Asociado ĝuas renomon. La platoj de la ĉefparto de komputoro kaj la montriloj produktitaj de la kompanio Asociado konsistigas respektive 3% kaj 10% de la samspecaj produktaĵoj en la internacia merkato.

## TRI GRANDAJ KORIDOROJ EN ĈINIO

Sur la vasta teritorio de Ĉinio iuj longaj rubandformaj regionoj estas nomataj "koridoro", kaj en Ĉinio estas tri famaj koridoroj Hexi (Heŝji), Liaoxi (Ljaŭŝji) kaj Haishang.

**HEXI-KORIDORO,** situanta inter la montaroj Qilian (Ĉjiljan) kaj Beishan, estas baseno en la nordokcidento de Gansu-provinco. Ĝi longas 1 200 kilometrojn kaj larĝas kelkajn ĝis 300 km. En la koridoro estas montoj, dezertoj kaj oazoj. La fama antikva Silka Vojo trairis la koridoron kaj Tarim-basenon kaj fine atingis la Okcidentan Azion kaj Eŭropon.

**LIAOXI-KORIDORO** Sudokcidente en Liaoning-provinco estas malaltaj montaroj, sed ĉe Bohai-maro etendiĝas longa ebenaĵo kun larĝo de 1-10 km. Ĝi estas grava pasejo inter la nordorienta Ĉinio kaj ĝiaj aliaj regionoj.

**HAISHANG-KORIDORO** La markolo Taiwan estas grava pasejo inter la Orienta Ĉina Maro kaj la Suda Ĉina Maro. La insularo Penghu en la markolo estas tre grava loko por marnavigacio.

## GONGO


Gongoj aperis en Ĉinio antaŭ 2 000 jaroj. Ili estis vaste uzataj en ceremonio kaj milito. Ili havas multajn specojn kaj pezas kelkajn taelojn ĝis dekojn da kilogramoj, kiujn oni devas pendigi. Antaŭ 200 jaroj ili enkondukiĝis en Eŭropon kaj en la fino de la 18-a jarcento ili estis uzataj de belga komponisto F. J. Gossec en simfonia orkestro. Poste ili estis pli kaj pli multe uzataj en la mondo. Ili estas unika ĉindevena muzikilo en simfonia orkestro.

Gongoj de Ĉinio havas diversajn formojn kaj uzojn. Kiam la imperiestroj iris al kunveno de korteganoj, aŭ ili kaj korteganoj estis vojaĝantaj aliloken, oni nepre devis sonigi gongojn por sciigi pri ilia alveno.

Estis interesa moro: kiam mandarenoj, kiel ajn altrangaj, renkontis ceremonian vicaron de geedziĝo, ili devis halti por cedi la vojon, observante la kutimon, ke geedziĝo estas grava feliĉa afero kaj oni neniel devas prokrasti la aferon. Nun gongoj estas uzataj en popolaj festoj, geedziĝo, ofertado de vagabondaj artistoj, surmara alarmado, komunikado de informoj kaj moderna boksa matĉo.



S-ro Ding Tiejun manipulanta komputoron



Ding Tiejun kaj lia patrino

**XIAO NAN:**

# Miraklo de amo

TIO estas vera okazaĵo. En la Orienta Distrikto de Pekino vivas 23-jara s-ro Ding Tiejun (Ding Tjeĝjun). Pro metencefala anoksio ĉe la naskiĝo li suferas de serioza cerebra paralizo, kiu spasmigas liajn muskolojn kaj anomaliigis liajn membrojn. Li ne povas paŝi nek paroli klare. Helpate de sia patrino, kuracistoj kaj najbaroj nun li scipovas sin vesti, legi, skribi kaj manipuli komputeron. Li ricevis diplomon pri finiĝo de lernado en ĉin-medicina kolegio. Li funkciigas konvaleskan konsultejon, la unuan administratan de malsanulo de cerebra paralizo en Ĉinio, kiu servas al la tutlandaj handikapuloj.

Samkiel normala homo, li laboras kaj kontribuas al la socio. Tio ja estas miraklo. La miraklon kaŭzis la senlima amo de lia familio kaj la tuta socio.

La patrino de Ding Tiejun estas ĉirkaŭ-50-jara profesiulino. Ŝi konigis al mi, kiel ŝi kulturis Tiejun. Ŝi diris: "Mi estas ordinara intelektulino. Mia familio havas 5 membrojn: la bopatrino, edzo, 2 infanoj kaj mi. Mia filino, la pliaĝa fratino de Tiejun, estas tute normala, sed Tiejun, mia juna filo, estas denaska paralizulo. Pro mia akuŝmalfacilo li sufokiĝis kaj estis trafita de cerebra paralizo. De lia naskiĝo mi kaj mia edzo neniam perdis la esperon sur li."

Kiam Ding Tiejun estis knabo, liaj gepatroj plurfoje veturis aliloken por lin kuraci. En la pasintaj jaroj liaj avino, gepatroj aŭ fratino portis lin sur la brakoj al hospitalo por lin kuraci. Hodiaŭ multaj najbaroj ankoraŭ klare memoras, ke ĉiutage malforta knabino, kiu portis kuntiriĝintan knabon en la sino, kaj maljunulino kun ombrelo kune iris al hospitalo. Por porti sian fraton al la hospitalo la ĉirkaŭ-10-jara knabino ĉiutage forestis je unu leciono. Por ke ŝia frato spiru freŝan aeron eksterdome, ŝi portis lin sur sia dorso kaj iris laŭ ŝtuparo supren kaj malsupren dum dekkelkaj jaroj. La familianoj klopodis plurajn jarojn por lin kuraci. Ili konsultis preskaŭ ĉiujn eminentajn kuracistojn de la lando kaj finfine konvinkiĝis, ke estas neeble resanigi malsanulon turmentatan de cerebra paralizo kaŭzita de sufokiĝo ĉe la naskiĝo. Sed kion faris lia bonkora patrino efektive?

"Konvinkiĝinte, ke estas nekuracebla la cerebra paralizo, ni komencis pli bone eduki lin kaj laŭeble traktis lin kiel normalan knabon. Kiam Tiejun estis 6-jara, ni komencis instrui al li legi kaj skribi. Por lia fizika ekzercado ĉiutage ni portis lin eksteren, por ke li povu spiri freŝan aeron, kaj krome, ni pendigis 2 ringojn sur la lintelo de la pordo, por ke li tenu la ringojn kaj faru sinlevadon. Per siaj tremantaj manoj li komencis la ekzercadon, po 30 minutojn ĉiutage. Tion li faris dum 10 jaroj. Mia edzo ŝatas filozofion, historion kaj internacian politikon. Liaj diligenteco kaj mondkoncepto multe influis Tiejun. Tiejun, longe turmentate de grava malsano, ne deprimiĝis, tion oni devas atribui al la edukado far lia patro. Ni havas multajn intelektulojn-amikojn. Ili ofte vizitas nin. Ni neniam kaŝas Teijun for de la gastoj pro lia kripleco. Ni lasas lin aŭskulti nian interparolon por koni la socion. Li ja konis multajn okazaĵojn kaj elĉerpis multe el la legado."

La sincera amo kaj bonefika edukado far la patrino kaj aliaj familianoj liberigis lin el malĝojo kaj malespero. Li memvole lernas. Li amas ĉion ĉirkaŭe. En rulseĝo li vojaĝis kune kun sia patrino en la plej malriĉa montregiono kaj plej riĉa loko de Ĉinio. Li ekkonis la homojn kaj aferojn ekster sia hejmo. Ĉio ĉi larĝigis liajn vidkampojn kaj havigis al li memfidon: Ankaŭ la handikapuloj devas kaj povas fari siajn kontribuojn al la socio.

Julie de 1989, Ding Tiejun venis al la Ĉina Konvaleska Centro por esti kuracata. Tie oni lin kuracis 43 tagojn. Zorgate de kuracistoj kaj dank' al sia firma volo, li ellernis mem manĝi, sin vesti kaj eĉ zorgi pri aliaj aferoj en la ĉiutaga vivo. Tie li lernis ankaŭ konvaleskan medicinon. Kun profunda emocio li diris: "La scienco donis al mi kapablon, kiun mi ne posedis hejme en la pasintaj 20 jaroj. Nun mi

povas mem vesti min. Por vestiĝo mi bezonas unu horon en somero kaj pli da tempo en vintro. La normalaj homoj eble rigardas tion neimagebla, sed mi estas fiera. Finfine mi povas zorgi pri mi mem en la ĉiutaga vivo."

La malsano misformis la korpon de Tiejun, tamen ĝi neniel povis ŝanĝi lian bonkorecon. Li diris: "Mi havas feliĉan familion. Ĝi donis al mi bazan edukadon. Dank' al tio, mi akiris kapablon por memlernado kaj sufiĉan eltenemon. Nun mi ne timas plu mian malsanon. Mi legis verkojn pri konvaleska medicino kaj povas manipuli komputeron. Tamen, ne ĉiuj handikapuloj vivas en tiaj cirkonstancoj, kiel mi. Nun Ĉinio ne estas riĉa kaj mi devas havigi al mi ian laboron. Mi funkciigas konvaleskan konsultejon. Mia patrino aĉetis por mi komputeron kaj mia laborkapablo kelkdekoble pli grandiĝis ol antaŭe. Nun ĉi tie laboras mi sola. Kvankam al mi mankas helpantoj kaj mono, tamen mi certe venkos ĉiujn malfacilojn en la laborado."

Informiĝinte pri lia intenco, liaj najbaroj, amikoj kaj aliaj donis al li grandan helpon. La 5-an de marto, 1993, oni okazigis inaŭguran kunvenon por lia konvaleska konsultejo.

Ĉu sukcese laboras la konvaleska konsultejo funkciigata de Tiejun? Oni diris, ke ĝi estas tre sukcesa. Tiejun ricevis leteron de Shanxi(Ŝanŝji)-provinco. En la letero la gepatroj de iu kripla infano Zhang Biwu (Ĝang Bi'u) konigis al Tiejun la malsanon de la infano. Analizinte la malsanon de Zhang kune kun kuracistoj, Ding Tiejun respondis al ili: "Via infano suferas eble ne de cerebra paralizo. Bonvolu sendi al mi konkretajn materialojn!" Ricevinte la duan leteron de la gepatroj de Zhang, Ding Tiejun konvinkiĝis, ke Zhang suferas ne de cerebra paralizo, kaj letere konsilis, ke Zhang veturu en Pekinon por esti kuracata. La diagnozo montris, ke Zhang suferas de artika kontrakturo. Tio helpis la infanon eviti miskuracadon.

Multaj gepatroj, kies infanoj suferis de cerebra paralizo, ne volis plu kuracigi ilin, kredante pri la nekuracebleco de la malsano. Ili tamen reakiris fortojn el la aferoj de Ding Tiejun kaj skribis al Ding por peti metodojn eduki kaj kulturi malsanajn infanojn. Surbaze de siaj propraj spertoj kaj teorio de la konvaleska medicino, Ding Tiejun elpensis detalan kurac-metodon por ĉiu malsana infano.

Patro de iu malsana infano skribis al Tiejun: "Mia infano naskiĝis decembre de 1991. Ĝis hodiaŭ li ankoraŭ ne scias voki patron kaj patrinon. Li ne povas iri. Ni estas edifitaj de via vivovojo kaj vidis esperon..."

Iu malsanulo letere petis Ding Tiejun aĉeti por li medicinan aparaton.

Estis neatendite, ke la firma volo de la juna kriplulo donis esperon al tiom multe da malsanaj infanoj kaj iliaj gepatroj... ■

ESCEPTE emeritojn, ĉiuj ĉinaj urbanoj devas klopodi por la vivo. Post kiam ili revenas hejmen de sia laboro, multe da mastrumaĵoj atendas ilin. Malgraŭ tio, pli kaj pli multaj homoj sukcesas trovi tempon por fari diversajn sportajn aktivadojn. Ili ludas spadon, sin ekzercas per tajĝiĉjŭan-o, ĉigongo, gimnastikoj, kurado kaj stamfo, svingas brakojn kaj laŭte krias. En la lastaj jaroj aperis matenaj baloj surstrate, ĉina aroma ĉigongo kaj sportoj per gimnastiloj. Ĉio ĉi tio montris, ke ĉinoj donas pli kaj pli grandan atenton al sportoj.

## STRATAJ BALOJ

Ĉiumatene, de la 6-a ĝis la 9-a, spontanea balo okazas ekster la norda pordo de la Pekina Laborista Stadiono. La nombro de la dancantoj ofte superas 300. Ili dancas unue disko-on, poste valson kaj aliajn dancojn. Agrablaj muzikoj kaj belaj dancmovoj allogas multajn pasantojn. Tio okazas ne nur ĉi tie, sed ankaŭ en strataj ĝardenoj kaj parkoj. Ĝi troviĝas ne nur en Pekino, sed ankaŭ en Shenyang, Tianjin (Tjanĝin), Hangzhou, Qingdao, Changsha kaj aliaj urboj.

Antaŭe la baloj okazis dome, kaj ilin partoprenis ĉefe gejunuloj. En la balejo brilis neonlampoj. Oni dancis akompanate de muziko ludata de orkestro. Tiaokaze ĉiuj dancantoj estis vestitaj bele.

La stato estas tute malsama en strataj balejoj. En la lastaj jaroj furoris disko-o. La ĉinstila disko-o kun pli mildaj movoj tenas la originajn trajtojn: turni talion kaj korpon, danci laŭ sia plaĉo k.a. La dancantoj ĉefe estas pli-ol-60-jaraj maljunuloj. Kaj poste oni dancis ankaŭ valson, tiam partoprenis mezaĝuloj kaj junuloj. En ordinara vesto ili ĉiuj dancas vigle, senĝene kaj libere en freŝaera stratbalejo.

Kiam mi demandis, kial ili estas tiel fervoraj en la danco, ili respondis:

Unue, por sano. Plejparto da maljunuloj dancas por tio. Kaj nemalmultaj mezaĝulinoj opinias, ke danci estas pli vigle ol sin ekzerci per la luktarto tajĝiĉjŭan-o kaj ili utilas al maldikiĝo, kuracas sendormecon, hipertension, kronikan stomakiton kaj aliajn kronikajn malsanojn. Tial ili konsideras la matenan kaj vesperan stratbalon kiel nemankigeblan.

Due, por bonhumoriĝo. Mezaĝaj kaj junaj homoj diris, ke post nokta dormado, la dancado eksterdome en mateno estas tre plezuriga kaj dank' al tio oni povas vigle labori dum la tuta tago.

Trie, por amikeco. Krom ekzercado, iuj maljunuloj frekventas balejon ankaŭ por elverŝi sian koron al maljunaj k-doj. Dancante, ili sin liberigas de malĝojo kaj ĉagreno, akiras nemalmultajn informojn, ekz., kiel prepari pladon, kiu medicinaĵo estas efika ktp.

## ENTUZIASMO POR AROMA ĈIGONGO

Ĉinio havas multajn tradiciajn sanigajn ĉigongojn ŝatatajn de popolanoj. Nun la aroma ĉigongo

ZHANG QINGZHEN:

# Furoras sanigaj ekzercoj

furoras en Ŝanhajo, Tianjin, Kunming, Xi'an (Ŝji'an) kaj aliaj urboj. Oni diras, ke ĝi estas enkondukita ankaŭ en Hongkong, Taiwan kaj Sudorientan Azion.

En pekinaj parkoj kaj sur liberaj lokoj ĉe vojoj ofte vidiĝas amasoj da ekzercantoj de la aroma ĉigongo. En iu frua somera mateniĝo, mi venis en iun parkon proksiman al mia hejmo kaj vidis, ke granda amaso da homoj sin ekzercas per la aroma ĉigongo. En la matena krepusko ili moviĝis laŭ muziko. Ŝajnis al mi, ke la vigla trafiko kaj bruoj 10 m fore neniom ilin ĝenis.

Kiam ili finis la ekcercadon, mi ekbabilis kun ilia gvidanto, maljunulino Li. Ŝi diris al mi: "Ekzercinte min per multspecaj ĉigongoj, mi trovis ke la aroma ĉigongo estas simpla, facile lernebla kaj per ĝi oni povas sin ekzerci en ajna loko kaj sub ajnaj kondiĉoj. Gemaljunuloj en mia aĝo tion faras 2-foje ĉiutage, malgraŭ ke tio ne donas magian efikon. Kiu ne deziras longe vivi?" Montrante iun maljunulon, ŝi diris al mi: "Jen, lin atakas nekuracebla malsano. Por li estas pli bone iom moviĝi eksterdome ol ŝlosi sin hejme."

Tamen la aroma ĉigongo estas efika ne nur por sanigo, alie ĝi ne povas furori tiel rapide tra la tuta Ĉinio.

Emerita inĝeniero Chen Jishan de la Tianjin-a Dagang-petrolkampo estis malsanulo. Li suferis de atrofia stomakito kaj kormalsano, kiuj tre turmentis lin. Post kelkmonata lernado li ellernis la aroman ĉigongon en la elementa kaj mezgrada kursoj, kie oni ekzercas ĉefe la kvar membrojn. Li persiste sin ekzercis dum kelkaj jaroj, liaj malsanoj mirinde foriĝis iom post iom. La novaĵo rapide disvastiĝis tra la petrolkampo. Poste li ekinstruis la ĉigongon kaj nuntempe la nombro de liaj lernantoj superis mil.

Estas ofte videbla jena sceno: post ekzercado, maljunuloj ne tuj foriras, ili aŭ interŝanĝas spertojn aŭ babilas pri hejmaj aferoj. Jen dialogo inter du maljunulinoj:

"Hejme ĉiam estas senfina mastrumado. Kiam mia nepo ne volas viziti infanĝardenon, mi devas lin prizorgi, kio estas laciga kaj enuiga."

"Mi ne vartas mian nepon. Ĉar mia edzo forpasis, mi ne volas sidi hejme, mi ŝatas eliri por min distri."

Poste, ili interkonatiĝis. La homoj bezonas interŝanĝon de siaj sentoj kaj interkompreniĝon. Precipe tiuj, kiuj ĵus emeritiĝis post kelkdek-jara laboro, pli forte deziras kontaktiĝi kun aliaj. Kaj danci kaj sin ekzerci per tajĝiĉjŭan-o kaj la aroma ĉigongo taŭgas por ilia kontaktiĝo.

## SPORTAJ ENTREPRENOJ

Dank' al prospero de sportoj aperis sportaj entreprenoj.

En Kantono funkcias la Jianlibao-a Sport-edeno kun areo de 5 000 kvadrataj metroj kaj vico da elegantaj unuetaĝaj domoj en L-formo, kiuj ĉirkaŭas verdan gazonon. Sub la varma suno en suda Ĉinio, la edeno kaŝis sin en la ombroj de densaj bambuaro kaj arbaro ĉe lago.

En la edeno funkcias gimnastikejo, vira defendlukta halo, virina gimnastika halo, sportinstrumentaj haloj por viroj kaj virinoj, kun sportaj videoregistraj kaj sondissendaj instalaĵoj, pli ol mil modernaj gimnastiloj, vaporbanejoj, kosmetikejo, kafejo kaj naĝbasenoj, sur kies bordoj kuŝas komfortaj litoj kaj bambuaj levseĝoj, sur muroj kaj ĉe anguloj de la halo pendas ĉiamverdaj vegetaĵoj.

En Kantono troviĝas 6 tiaj sport-edenoj kaj ĉ. 50 ordinaraj sportejoj, la nombro de ties vizitantoj superis 50 000. En Shenzhen, Fuzhou, Ŝanhajo kaj aliaj urboj karaoke, bilardo kaj aliaj sportaj aktivadoj fariĝis nemankigebla parto de la kultura vivo de la civitanoj. ■

Matena korpo-ekzercado



# Simplaj sanprotektaj metodoj

I. KOMBADO

Laŭ la teorio de akupunktura terapio ĉiuj ĝinglŭo-vojoj trairas la homan kapon, kie troviĝas dekoj da akupunkturaj punktoj. Kombado dilatas la kapilarajn angiojn, akcelas la sangocirkuladon kaj tenas la cerbon en bona stato. Pli grave estas, ke kombado ekscitas akupunkturajn punktojn, kio efikas same kiel akupunkturado kaj masaĝo. Ĝi estas efika por glatigi iradon de ĝinglŭo-vojoj, reguligi la funkcion de sango kaj vitala energio kaj protekti la sanon. Jen kombaj metodoj:

A. Kombu la harojn matene, tagmeze kaj vespere po unu fojo, nek tro forte, nek tro malforte. Kombu ĉiujn partojn de la krania haŭto, dum la kombado la kombilaj dentoj devas tuŝeti la haŭton. Ĉiufoje po 2-3 minutojn. Tio estas efika por mildigi vertiĝon, sendormecon kaj hipertension.

B. Kombu la harojn de antaŭe malantaŭen, 50 fojojn ĉiumatene. Faru tion laŭ la inversa direkto 50 fojojn. Tio estas efika por malfruigi harblankiĝon kaj forigi peladon.

C. Kombu la harojn unufoje ĉiutage kaj post tio per la kombilaj dentoj malpeze frapu la tutan kranion 5-10 minutojn. Post frapetado kombu la harojn denove. Tio estas efika por kuraci nervan kapdoloron, hemikranion kaj okulmalsanojn. Estas pli bone, se vi frapetas la akupunkturajn kaj dolorajn punktojn.

Kombiloj estas multspecaj, inter ili estas plastaj, metalaj, lignaj k.a. La plej efikaj estas kombiloj el malmola ligno.

II. MALSTREĈIĜO FIZIKA KAJ PSIKA

Malstreĉiĝo estas nemankigebla reordigilo por laboro kaj lernado, kio strikte rilatas al la homa sano.

Por malstreĉiĝo vi povas dormi, ripozi kaj fari fizikan ekzercadon, kaj krome, vi povas ankaŭ fari sisteman psikologian malstreĉiĝon, rekte utilan al la fizika kaj spirita sanstato. La sistema malstreĉiĝo povas mallevi la organisman vekiĝemon, pliigi la adaptiĝemon, forigi la spiritan kaj fiziologian malordon kaŭzitan de streĉiteco. Post intensa laborado vi eble deprimiĝas, tial vi devas malstreĉi vin por liberigi vin el la malagrableco. Post la fizika kaj spirita reordigo la funkcio de via organismo pliboniĝas kaj pli efike laboras, vi do fariĝos sana kaj gaja. Jen konkretaj metodoj por malstreĉiĝo:

A. FIZIKA MALSTREĈIĜO. Reguligu la movon de viaj muskoloj kaj ostaro kaj ŝanĝu vian pozon por malstreĉi vin kaj fizike kaj mense.

1. MALSTREĈIĜO DE LA MUSKOLOJ. Tio konsistas el 5 partoj. Fiksu la atenton; streĉu la muskolojn; daŭrigu la streĉitecon; ĉesigu la streĉitecon kaj malstreĉu la muskolojn. Prenu la brakan malstreĉiĝon kiel ekzemplon. Etendu la dekstran manon. Fiksu la atenton al la dekstra brako. Forte pugnigu la dekstran manon. Streĉu la tutan brakon. Streĉu ĝin pli kaj pli, por ke la streĉiteco atingu sian maksimumon. Tenu la streĉitecon 4-5 sekundojn, malrapide malstreĉu la brakon kaj malpugnigu la manon. Ripetu tion ankoraŭfoje. Faru la supre diritan per la maldekstra mano. Prenu la gamban malstreĉiĝon kiel ekzemplon. Etendu la dekstran gambon. Fiksu vian atenton al ĝi. Streĉu la tutan gambon, kvazaŭ vi premus ion tre malmolan per ĝi. Kiam la streĉiteco atingas sian maksimumon, tenu ĝin 4-5 sekundojn kaj post tio malstreĉu la gambon iom post iom. Ripetu tion ankoraŭfoje kaj faru la supre diritan per la maldekstra gambo. La malstreĉiĝo de la aliaj korpopartoj estas sama kiel la supre dirita.

2. MALSTREĈIĜO PER PROFUNDA SPIRADO. Enspiru profunde kaj malrapide, detenu vin de la spiro 4-5 sekundojn kaj malrapide elspiru. Per la profunda spirado vi povas vigligi la muskolojn de la spira sistemo kaj per tio malstreĉiĝas la muskoloj kaj ostaro de la tuta korpo. Kaj plie, la enspiro de sufiĉa oksigeno povas kvietigi vian animstaton.

B. PSIKA MALSTREĈIĜO. Faru fizikan reguligon per la reguligo en la lingvo, imago kaj sugesto por atingi la psikan malstreĉiĝon.


1. MALSTREĈIĜO DE IMAGO. Imagu, ke iom post iom malstreĉiĝas viaj muskoloj kaj ostaro. Imagu, ke vi kuŝas en kvieta medio, sur agrabla gazono, banata de varmetaj sunlumoj, vi tutkorpe estas en malstreĉiteco kaj klara fontakvo fluas en via korpo, de la kapo ĝis la piedoj. Kun la akvofluo viaj muskoloj kaj nervoj fariĝas malstreĉitaj.

2. MALSTREĈIĜO DE LA LINGVA SUGESTO. Ekz., se vi volas malstreĉi la kapon, vi do diru al vi mem: "Nun mi sentas, ke mia kapo estas agrable varmeta. Malstreĉiĝas la krania haŭto. La 2 tempioj jen streĉiĝas jen malstreĉiĝas. Mia frunto estas malstreĉita kaj varmeta. Miaj palpebroj estas tiel pezaj, ke mi apenaŭ povas malfermi miajn okulojn. Miaj nazo kaj oreloj estas malstreĉitaj. Mia vizaĝo estas agrabla kaj malstreĉita. Mia mentono estas malstreĉita. Mia kapo estas agrabla kaj malstreĉita."

Vi povas malstreĉi vin per tiuj metodoj alterne aŭ samtempe. Se vi faras konstantan ekzercadon kaj atenteme perceptas la senton, vi certe trovos la metodon plej taŭgan por vi mem kaj atingos vian celon. ■

HUA JUXIAN:

# Historiaj ŝanĝoj en Tibeto



Kamparanoj de antaŭurbo de Lhasa semas tritikon per maŝino.

La Tibeta Aŭtonoma Regiono, kies ekonomia konstruado estis postiĝinta dum longa tempo, kompare kun tiu de la landinternaj kaj marbordaj provincoj de Ĉinio, spertas multe de historiaj ŝanĝoj de la lastaj jaroj, puŝate de la ekonomia disvolviĝo de la tuta lando.

## RIĈA RIKOLTO EN LA JARO DE NATURA KATASTROFO

Tibeto ricevis riĉan rikolton en sinsekvaj 4 jaroj, sed en 1992 tie okazis sekegeco kaj atako de fiinsektoj. Neatendite, la grena produktokvanto de la jaro atingis 600 milionojn da kg kaj per tio kreis la plej bonan rekordon en la historio. La produktokvanto de viando, lakto kaj lano de la regiono kreskis respektive je 4.6%, 2.2% kaj 2.2%, kompare kun tiuj de 1991. La pokapa kvanto de brutoj okupis la unuan lokon en la lando.

Kie kuŝas la kaŭzo pri la riĉa rikolto en la katastrofa jaro? La kamparanoj kaj paŝtistoj resumis jene: Unue, akvoutiligaj konstruoj ludis grandan rolon; due, disvastiĝis scienca terkulturado.

Laŭ statistiko, de 1982 la Tibeta Aŭtonoma Regiono asignis 1.218 miliardojn da juanoj por disvolvi agrikulturan produktadon. La monsumo estis uzata ĉefe en la akvoutiliga konstruado por kampoj. Fine de 1992, la irigaciata areo de kampoj en la regiono konsistigis 58.5% de la totala agraro, la areo de la agroj, kiuj donas stabilan produktokvanton tiel en sekegeco kiel ankaŭ en superakvo, atingis 67 400 hektarojn kaj la irigaciata areo de paŝtejoj — 152 000 hektarojn. Krome, la ĉefaj agrikulturaj produktrimedoj, kiaj kemia sterko, insekticido kaj plasta membrano, estas senpage liverataj de la ŝtato kaj la agrikulturaj maŝinoj estas aĉetataj parte per ŝtata subvencio.

Agrikulturaj institutoj elkulturis pli ol 30 bonrasajn variojn taŭgajn por la malsamaj ekologiaj regionoj de la altebenaĵo. Post popularigo de tiuj varioj en la lastaj pli ol dek jaroj, nur la produktokvanto de vintra tritiko de la regiono pliiĝis je pli ol miliardo da kg. La bonrasigitaj ŝafoj en Tibeto jam produktas fajnan lanon kaj donas bonkvalitan viandon. La bonrasigita bovino ĉiujare produktas pli ol 2 000 kg da lakto kaj 45 kg da butero, 5.7-oble kaj 2-oble pli multe ol tiuj de loka bovino. Ĝi pezas je 50% pli multe ol la lasta.

## NOVAJ ENTREPRENOJ

Tibeto estas vasta agrikultura kaj paŝta regiono de Ĉinio. Ĝia industrio leviĝis malfrue. Kiam la marbordaj vilaĝaj entreprenoj prosperis, la tieaj vilaĝaj entreprenoj estis en ĝermado.

Por ŝanĝi tiun postiĝintecon, en 1991 la registaro de la regiono publikigis la "Decidojn pri Energia Disvolvado de Vilaĝaj Entreprenoj". De 1992, ĝi ĉiujare asignas 40 milionojn da juanoj por disvolvi vilaĝajn entreprenojn. En la fino de 1992 funkciis tie pli ol 8 700 vilaĝaj entreprenoj.

Dank' al la reformada kaj pordmalferma politiko, ankaŭ vigliĝis la terciara industrio de Tibeto, precipe rapide disvolviĝis trafiko, telekomuniko, komerco, manĝaĵa industrio, financa asekuro, sociaj servoj ktp. La tibeta turismo, karakterizita per altebenaĵa neĝpejzaĝo, iom post iom fariĝis ĉefa konsistiga parto de la terciara industrio de Tibeto. Laŭ la itinero kun Lhasa kiel la centro, trairanta Xigaze, Shannan, Nagqu kaj Ali, jam vojaĝis 110 800 eksterlandaj turistoj en la pasintaj jaroj.

En la agrikulturaj kaj paŝtaj regionoj funkciigi la terciaran indus-

## AMUZOJ

# Pri la konkurso de EPĈ-legado

1. Por la ĉi-foja konkurso estas 15 demandoj, ĉiu kun 3 respondoj. Elektu unu ĝustan respondon el la donitaj kaj skribu en la blanko sur la papero. (Kopii la demandojn estas nebezonate.)

Ĉiuj ĝustaj respondoj troveblas en la 1-11-aj numeroj de EPĈ en 1993.

2. Ĉiu respondanto ricevos malgrandan memoraĵon. Tiuj, kiuj partoprenis 3 el la 4 konkursoj, ricevos memoraĵon por fervora leganto, do bonvolu mencii en la respondo al ni, kiom da fojoj vi partoprenis. La sukcesintoj en la respondo de ĉiuj demandoj havos ŝancon esti premiitaj per lotumado far nia redakcio.

La sola gajninto de la unua premio ricevos verkon de ĉinaj kaligrafaĵoj.

Ĉiu el la 10 gajnintoj de la dua premio ricevos aŭ miniaturan simion faritan de s-ro Cao Yijian (Caŭ Jiĝjan) aŭ gluitan ŝtofartaĵon faritan de s-ino Zhang Qi. (Legu la artikolojn "Miniatura simio" kaj "Gluitaj ŝtofartaĵoj" respektive en la 3-a kaj 5-a numeroj de nia revuo.) Se vi preferos la antaŭan, bonvolu skribi "E" en la fino de via respondo; se la lastan, bonvolu skribi "F" tie.

3. Sendu vian respondon al s-ro Li Qiang (Adr.: El Popola Ĉinio, P.O. Kesto 77, Pekino, 100037, Ĉinio) antaŭ la 20-a de decembro, ĉi-jare (laŭ la dato de la poŝtstampo). Sendo post la limdato estos senvalida.

4. Ni estos ĝojaj, se vi skribos al ni viajn konsilojn kaj rimarkigojn koncerne la similan aktivadon.

## Demandoj

1. La 4 famaj budhismaj montoj de Ĉinio estas        , Emei-monto, Putuo-monto kaj Jiuhua-monto.

a. Taishan-monto b. Wuyi-monto c. Wutai-monto

2.                fondis la unuan unuecan centralizitan feŭdisman ŝtaton en la historio de Ĉinio en 221 a.K.

a. Wudi-imperiestro (imperiestro Liu Che) de la Okcidenta Han-dinastio

b. la Unua Imperiestro de Qin-dinastio

c. Taizong-imperiestro (imperiestro Li Shimin) de Tang-dinastio

3. Xianghai-a Naturparko estas hejmo de

a. ibiso b. ruĝvertaj gruoj c. krosoptilono

4. La 8-an de aprilo, 1984, Ĉinio sukcese lanĉis la unuan telekomunikan sateliton en

a. Xichang b. Taiyuan c. Jiuquan

5. En la nordokcidenta parto de Pekino, ĉe la montpiedo troviĝas templo        , kie vidiĝas belaj freskoj. Oni nomas ilin ĉinaj Sistinaj freskoj.

a. Biyun-templo b. Tanzhe-templo c. Fahai-templo

6. La unuan de julio de la jaro        Ĉinio restarigos sian suverenecon super Hongkongo.

a. 1997 b. 1995 c. 2000

7. Oni nomas la lokon        la Bonespera Kabo de Sichuan.

a. Chongqing b. Chengdu c. Qianjiang

8. La tibetnaciaj paŝtistoj de suda Gansu-provinco solenas        aŭguste.

a. Akvoverŝa festo b. Jingma-festo c. Budho-sunuma festo

9. S-ro Qu Lingjun elfaris delikatan paperan drakoŝipon en la daŭro de        monatoj.

a. 18 monatoj b. 20 monatoj c. 15 monatoj

10. Dank' al plurfoja esplorado en la rezervejo de grandaj pandoj, ĉinaj sciencistoj trovis, ke la grandaj pandoj havas    specojn.

a. 3 b. 5 c. 10

11. La plej granda moderna ŝtona gravuraĵaro de Ĉinio estas        , kiu konsistas el "Kanto de vivo", "Brilo de saĝo" k.a.

a. Luoyang b. Datong c. Deyang

12. La tibeta medicino kun intensa nacia koloro havas historion de        jaroj.

a. 5 000 b. 2 300 c. 3 000

13. La dio kultata de la ĉemaraj fiŝistoj de Ĉinio estas

a. drako-reĝo b. mardiino Mazu c. Poseidono

14. Lhasa, ĉefurbo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono, situas en la loko        metrojn super la marnivelo.

a. 3667 b. 4150 c. 3985

15. En Ĉinio nun funkcias        altteknikaj ekspluataj distriktoj.

a. 49 b. 55 c. 52

---


trion estas nova rimedo por disvolvi ekonomion de Tibeto. Nun, intelektaj komputiloj, tibetlingvaj kaj hanlingvaj komputiloj havas grandan debiton en Tibeto. En Lhasa, la ĉefurbo de Tibeto, funkcias multaj kompanioj pri informa kaj teknika konsultiĝo kaj vendado de tekniko, kiuj donas sintezan servon al agrikultura kaj brutobreda produktado.

Tibeto kuraĝigas la disvolviĝon de privata ekonomio kaj bonvenigas individuajn entreprenantojn de la landinternaj kaj najbaraj provincoj. Nun, en Tibeto servas multaj privataj magazenoj, restoracioj kaj barbirejoj.

Je la fino de 1992, en Tibeto funkciis 134 diversaj bazaroj, 38 el kiuj estis en urboj kaj 96 en la agrikulturaj kaj paŝtaj regionoj. De 1985, la negocvaloro de la bazaroj atingis sume 4 miliardojn da juanoj, i.a., tiu en 1992 estis jam 700 milionoj da juanoj.

## FARUNAĴO EL BAKITA HORDEO KAJ FRANDAĴOJ

La 5-jara riĉrikolto de agrikulturo kaj brutobredado multe plibonigis la vivon de la kamparanoj kaj paŝtistoj de Tibeto. En 1992 la pokapa grenkvanto atingis 300 kg. La altiĝo de la vivnivelo ŝanĝis la strukturon de la manĝaĵoj de tibetanoj. Dum longa tempo la tibetanoj prenis farunaĵon el bakita hordeo kiel la ĉefan manĝaĵon, sed nun ankaŭ ili tre ŝatas manĝaĵojn de suda Ĉinio kaj aliaj lokoj, kiaj fritita plado, rizaĵo kaj biero. Nun en la tieaj urboj la manĝaĵoj estas aparte riĉaj. En Lhasa oni vendas centon da specoj da etmanĝaĵoj. Enketo montris, ke la meznombra vivdaŭro de tibetanoj kreskis de 36 jaroj antaŭ 1959 al 64 jaroj en 1992. Eble tio havas ian rilaton kun ŝanĝiĝo de la manĝaĵa strukturo. ■



Brika skulptaĵo sur alero

# Kvadrata korto en Pekino

Fotoj de **LIU SIGONG** kaj **HAN HONG**


Je mencio de kvadrata korto oni nature rememoras Pekinon, ĉar la urbon karakterizas kvadrataj kortoj.

La kvadrata korto en Pekino estas konata kiel tipo de loĝejoj de Ĉinio. La pordo de la kvadrataj kortoj ĝenerale rigardas suden kaj havas loĝdomojn ĉirkaŭe. Krom la frontaj loĝdomoj rigardantaj al sudo, en la korto estas ankaŭ flankaj domoj kaj domoj, kiuj rigardas norden. La korto havas pordon ĉe la sudorienta angulo.


La pordoj estas diversspecaj. En Ming- kaj Qing-dinastioj (1368-1911) oni donis apartan atenton al dekorado de la pordoj de kvadrataj kortoj. Oni opiniis, ke tie la brika skulptaĵo, ligna gravuraĵo kaj ŝtona koloneto por ligi ĉevalon vidigas la rangon de la dommastro.

Kvadrataj kortoj pli kaj pli multiĝas kun la kreskanta grandiĝo de la urbo. Tiel vico kaj vico da tiaj kortoj interligiĝas per koridoroj, alivorte, stratetoj.

Kiom da stratetoj estas en Pekino? Maljunaj loĝantoj diris: "360 stratetoj havas sian nomon kaj stratetoj sennomaj estas nekalkuleblaj." Do des pli sennombraj estas kvadrataj kortoj en Pekino.




En la profundo de strateto




Pordo de kvadrata korto


En kvadrata korto







Alero de kvadrata korto



Ŝtona koloneto destinita por ligi ĉevalon



XIAO NAN:

# Vidaĵoj en antaŭurbo de Ŝanhajo

EN la antaŭurbo de Ŝanhajo, sur la Delto de Yangzi-rivero estas vasta kamparo. Pro historiaj kaŭzoj kaj postiĝinteco de administrado kaj tekniko, la tiea ekonomio disvolviĝis malrapide. Ĉi-jare mi vizitis la lokon, kiu donis al mi impreson tute freŝan.

## EN ANTAŬA "VILAĜO DE SOLULOJ"

Huanxing(Hŭanŝing)-vilaĝo en antaŭurbo de Ŝanhajo antaŭe famis kiel "Vilaĝo de Soluloj". Tieaj fraŭloj ne povis edziĝi pro malriĉeco. Sed nun ĝi posedas riĉaĵojn en valoro de milionoj da juanoj.

Mi intervjuis vilaĝestron Zhu Renyun (Ĝu Ĵenjun), kiu estas mezaĝulo forta, pensema kaj honesta. Li legis klasikajn librojn. En la lastaj jaroj li organizis la malmulte klerigitajn junulojn en la vilaĝo kaj instruis al ili teknikojn por disvolvi flankokupon.

Por starigi fabrikon de hejtaj instalaĵoj, Zhu iris al la fako de civila konstruado de Ŝanhajo por lerni teknikojn kaj inviti teknikistojn. Nun la fabriko produktas 35 specojn da instalaĵoj por hejtado kaj ventumado, kiujn uzas 80% de la luksaj hoteloj kaj restoracioj en Ŝanhajo. Ĝiaj produktaĵoj servas ankaŭ en la Internacia Konferenca Centro de Egiptio. La agrikultura kaj industria produktovaloro de la vilaĝo okupas la unuan lokon en la gubernio.

Helpe de instruistoj invititaj de s-ro Zhu, tieaj junuloj lernas teknikojn. Nun 40 el ili fariĝis asistantaj inĝenieroj, teknikistoj aŭ kvalifikitaj laboristoj.

## KULTURA VIVO EN DIVERSECO

En multaj vilaĝoj funkcias lernejoj, kie oni lernas kulturadon de infanoj, familian etiketon, vestadon, kosmetikon, loĝdoman dekoradon kaj spektadon de artoj.

30-jara vilaĝano Li Siliang projektis kaj konstruis etaĝdomon kun plankareo de 200 kvadrataj metroj post lernado. Hela kaj eleganta, ĝi havas muron ŝpruce lakitan, granitan plankon kaj helverdajn aluminiajn ĵaluziojn.

Mi venis al Daxinxiang(-Daŝinŝjang)-vilaĝo en verdaĵoj. Enirinte la forcejon de f-ino Ajuan (Aĝjŭan), mi tuj dronis en maro de floroj: krizantemo, kariofildianto, kamelio k.a.

Fotografio estas ŝatata de junuloj. En la domo de novedzino Xiaoling (Ŝjaŭling) la plej atentoaltira estis foto sur muro farita de ŝia edzo. Sur la foto la novedzino radias de rido, sur la fono kun la subiranta suno, helblua monteto kaj zigzaga rivereto.

Fotoamatoro Xiaozhang (Ŝjaŭĝang) okazigis konkurson de fotado kaj kontribuis por ĝi per dekmil juanoj kiel premio. Li kolektis 800 fotojn kaj ekspoziciis ilin en la montrofenestro de kamparanoj-fotoamatoroj lanĉita de li en la Granda Amuzejo Dashijie (Daŝiĝje) de Ŝanhajo, kaj iuj verkoj estis eksponataj en Pekino.

## VILAĜO DE POPOLA PENTRARTO

Kelkaj vilaĝoj en la antaŭurbo de Ŝanhajo estas konataj de la mondo kiel vilaĝoj de popola pentrarto. Tie mi informiĝis de vilaĝanoj pri la kultura interŝanĝo de pentrarto inter Ĉinio kaj aliaj landoj.

En serena somertago jugoslava recenzisto vizitis Zhonghong(-Ĝonghong)-vilaĝon. La vilaĝanoj bonvenigis lin per eksplodigo de krakfajraĵoj. Renkonte al li iris junulino en multe plisita antaŭtuko kaj blua vesto kun desegnoj. Ŝi estis Cao Xiuwen(Caŭ Ŝiŭŭen), kiu lertas en pentrado.

"Ĉu vi estas s-ino Cao? Jen la foto de vi kaj fama verkistino Elizabeth Comber." Dirante tion, li montris al ŝi ĵurnalon de Hongkong. En la ĉambro de Cao li vidis lignajn pletojn kun delikataj gravuraĵoj "Fiŝoj kaj Lotuso" kaj "Pigo sur Arbo", kiuj simbolas bonaŭguron. La malnova litego estas ornamita per gravuraĵo "Ĝojaj Geedzoj" kaj la litkurteno surhavas freŝkoloran brodaĵon "Feliĉa Familio". Sur muro vidiĝas pentritaj floroj. Rigardante, li ne ŝparis siajn laŭdvortojn.

"En kiom da landoj vi ekspoziciis viajn pentraĵojn?" li demandis.

"En 12 landoj kaj regionoj, kiaj Usono, Francio, Germanio, Japanio, Belgio, Svisio kaj Hongkong," ŝi respondis.

"Vi estas artistoj mondkonataj. Mi volus kolekti viajn verkojn en mia albumo de mondaj kamparanaj pentraĵoj." Je tio, li fotis pentraĵojn unu post alia.

Inter la pentraĵoj, krom lignogravuraĵoj, modlaĵoj kaj paŝteloj, estas blovpentraĵoj kreitaj de juna

kamparano Zhu Mojun (Ĝu Moĝjun).

Foje, japana 60-membra delegacio de teceremonio prezentis la antikvan teceremonion en la vilaĝo. Por danki la gastojn, s-ro Zhu faris blov-pentradon. Li verŝis tuĉon sur paperon kaj forte ĝin blovis. Jen aperis umearbo kun trunko, branĉoj kaj folioj, kaj ankaŭ umefloroj. La gastojn mirigis lia pentrarto. Ĝin raportis al la mondo japana televida stacio.

Kiel membro de la Ŝanhaja Kultura Delegacio, s-ro Zhu partoprenis la Centjariĝon de Jokohamo, Japanio. En la 35-taga restado li faris blov-pentradon en Jokohamo, Tokio, Osako kaj aliaj 6 urboj, kio sensaciis la landon. Lian prezentadon oni videoregistris kaj uzas la registraĵon kiel lernilon por japanaj elementlernejanoj.

Inter la spektatoroj estis ankaŭ s-ro Schmidt, ĉefministro de FR Germanio, lia edzino kaj usona senatano s-ro Li Shuo.

## NUNTEMPAJ ĈINAJ KAMPARANOJ

Kiam 500 aŭtomobiloj "Santana" kun la ideogramoj "Qizhong(Ĉjiĝong)-vilaĝo" sur si veturis de Ŝanhajo al la vilaĝo, kie novaj etaĝdomoj de kamparanoj kaŝiĝis inter arboj, mi vere sentis grandan ŝanĝiĝon en la kamparo.

Oni diris al mi, ke en la lastaj jaroj la vilaĝo kreis valoron de pli ol cent milionoj da juanoj. Ili funkciigis unuaklasajn vilaĝajn entreprenojn, muntis irigaciajn kaj drenajn instalaĵojn kaj konstruis tenisan ludejon, plurfunkcian kulturan centron, surakvan klubon kaj stadionon.

En la konkurso de legoma kulturado de Ŝanhajo Kangjiazhuang (Kangĝjaĝŭang)-vilaĝo, najbara al Qizhong-vilaĝo, gajnis la plej altan premion "Ora Porko". Nun ĝi estas unu el la centmilion-juanaj vilaĝoj. La kamparanaj familioj uzas kranakvon, likvigitan gason, telefonon kaj televidan reton kun fermita cirkvito.

En la vizito mi informiĝis ankaŭ ke, kiam kamparanoj klopodas urbaniĝi, 40 oficistoj, teknikistoj kaj universitataj diplomiĝintoj memvole venis en vilaĝojn por tie fiksloĝi kaj labori. ■

# Monkolekto por Fondaĵo EPĈ-abono

Pro altiĝo de la kostoj de eldonado kaj sendado de "El Popola Ĉinio" ni reguligas de la pasinta jaro la abonkotizon kiel jene: la jara abono (inkluzive de sendokostoj) por la evoluintaj landoj kaj evoluantaj landoj respektive estas 26,00 kaj 14,40 usonaj dolaroj aŭ egalvaloraj valutoj ŝanĝeblaj en usonajn dolarojn. Pro tio la plejmulto de niaj legantoj en la orienteŭropaj landoj, la Komunumo de Sendenpendaj Ŝtatoj kaj la evoluantaj landoj, kiuj havas grandan malfacilon en ekonomio, ne povas plu aboni nian revuon. La reduktiĝo de abonantoj pli altigis la produktokoston de nia revuo kaj devigis nin malpliigi ekde ĉi tiu numero la kolorajn bildojn. Ĉi tie ni petas de niaj legantoj komprenemon kaj pardonon.

Konsiderante ilian fortan deziron daŭre legi nian revuon, ni decidis establi FONDAĴON EPĈ-ABONO, per kiu ni pagos la abonkotizon por iuj malnovaj legantoj kaj esperantistaj aktivuloj de la supre menciitaj landoj. Ni elprenos parton de la rentumo de Ghiselin-Fondaĵo de "El Popola Ĉinio" kiel bazan monsumon de FONDAĴO EPĈ-ABONO. (Tio tute konformas al la deziro de la belga samideano Charles Ghiselin, kiu testamentis, ke lia heredaĵo al EPĈ estu uzata por disvolvo de Esperanto.) Samtempe ni kore petas, ke esperantistoj de la landoj kun bonaj ekonomiaj kondiĉoj monoferu al FONDAĴO EPĈ-ABONO por helpi la nepagipovajn samideanojn. Bonvenas eĉ malgranda sumo. Ni ĉiujare aperigos en nia revuo la nomon kaj ofersumon de ĉiuj donacintoj. Helpemuloj bonvolu sendi monon (usonajn dolarojn aŭ valutojn ŝanĝeblajn en usonajn dolarojn) al la konto A/C No. 71411749 je la nomo From People China (El Popola Ĉinio) ĉe Bank of China (Banko de Ĉinio). La adreso de la Banko de Ĉinio estas: Fuchengmennei Dajie, CN-100818 Beijing, Ĉinio. Sendante monon, bonvolu sciigi al ni pri la celo de la oferita mono kun kopio de la banka ĉeko. Oni povas sendi ankaŭ monbiletojn (usonajn dolarojn aŭ valutojn ŝanĝeblajn en usonajn dolarojn) rekte al ni en registrita koverto. La adreso estas: El Popola Ĉinio, P.O. kesto 77, CN-100037, Beijing, Ĉinio.

Antaŭdankon pro via konsidero kaj monofero al FONDAĴO EPĈ-ABONO!

**La Red.**


## EKONOMIO

● La konstruado de la Trigorĝa Projekto de Yangzi-rivero estas en preparado. Laŭ la antaŭ nelonge sankciita "Primara Raporto pri la Plano por la Trigorĝa Pivota Projekto de Yangzi-rivero", la konstruado estos farata laŭ la projekto malfermi kanalan navigon kaj defluigi la fluon en tri etapoj. La kapacito de unuopa generatoro kreskos de 680 000 kW al 700 000 kW, la totala kapacito de la generatoro de 17.68 milionoj da kW al 18.2 milionoj da kW kaj la jara averaĝa produktokvanto de elektro de 84 miliardoj da kWh al 84.7 miliardoj da kWh. La konstruado daŭros 17 jarojn kaj post 11 jaroj elektro estos donita. La proksimuma budĝeto por la projekto ne superos 50.09 miliardojn da juanoj (laŭ prezaro en majo 1993).

● La 18-an de julio, la unuaranga haveno de Ĉinio Jingtang(Ĝingtang)-haveno en Tangshan malfermis internacian navigadon, kaj per tio finiĝis la historio, en kiu Pekino ne havis surmaran eksporton.

● Inaŭguriĝis la konstruado de Zhongtian-placo, Komerca Centro en Kantono julie, ĉi-jare. La ĉefa domo sur la placo, 80-etaĝa kaj 390 m. alta, estos la plej alta komerca domo en Azio. Sur la placo konstruiĝos ankaŭ du luksaj kunligitaj 38-etaĝaj pensionaj domturoj, aĉetejo kun areo de 34 800 kvadrataj metroj kaj subtera pluretaĝa garaĝo. La placo ampleksos 286 000 kvadratajn metrojn kaj ĝia konstruado finiĝos fine de 1995.

Vertikala dateno-rega turne-prema ilmaŝino de Ĉinio, avangarda je monda nivelo



● En 1992 la konfekcia grupo Hongdou de Wuxi(Uŝji)-gubernio, Jiangsu(Ĝjangsu)-provinco, fariĝis la unua provinc-nivela grupo de vilaĝa entrepreno en la provinco. Nun aperis en la gubernio aliaj 12 tiaj grupoj kun forta konkurenca povo.

En la unua duono de 1993 la industria produktovaloro de la entreprenoj atingis proks. miliardon da juanoj, je 80% pli multe ol tiu en la sama periodo de 1992.

● Ĉinio fariĝis la kvina granda lando produktanta kaj importanta ilmaŝinojn. La produktovaloro de ilmaŝinoj de Ĉinio en 1992 estis pli ol 1.7 miliardoj da usonaj dolaroj, nur post Japanio, Francio, Usono kaj Italio. La valoro de importitaj ilmaŝinoj estis 800 milionoj da usonaj dolaroj, post Germanio, Usono, Francio kaj Respubliko de Koreio.

● Laŭ datenoj donitaj de la Ŝtata Statistika Buroo de Ĉinio, la totala produktovaloro de Ĉinio en 1992 atingis 2 393.8 miliardojn da juanoj, egale al 458.6 miliardoj da usonaj dolaroj, kaj per tio Ĉinio enviciĝis inter la unuaj dek landoj de la mondo. Tamen, ĉiu ĉino meznombre posedas nur malpli ol 400 usonajn dolarojn, kaj Ĉinio ankoraŭ restas lando disvolviĝanta.

## SCIENCO KAJ TEKNIKO

● La frukto de la tekniko pri kulturado de tritikaj semoj estas gajnita sub la gvido de vicprofesoroj Sun Jitang (Sun Ĝjitang) kaj Si Aixiang (Si Ajŝjang). Ili sukcesis solvi la kontraŭdiron inter alta produkto kaj bona kvalito de tritiko.

La elkulturitaj 16 bonrasaj specioj de tritiko, entenantaj meznombre pli ol 19% da proteino kaj 0.45% da lisino, estas sur internacia avangarda nivelo. Testinte la produktokvanton de la bonrasaj specioj de tritiko, la fakuloj, kiuj ekspertizis la frukton, konstatis, ke ili kreskas rapide en bona ordo kaj donas grandajn masivajn spikojn.

● Estro Zhu Zuogen (Ĝu Zŭogen) de kultivejo de plantidoj en suda Ĉinio elkulturis vinberojn per importitaj sarmentoj. La vinberoj estas bongustaj kaj grandaj kiel tabloteniso. Ordinaraj vinberoj maturiĝas komence de aŭgusto, kaj japanaj sursarmentaj vinberoj fine de julio. Aplikante

provtubojn, li rapidigis la kreskon de vinberoj. La de li kulturitaj vinberoj grandnombre maturiĝas komence de julio, kun diametro de 4.2 cm kaj la produktokvanto je 40-50 pli alta ol tiu de ordinaraj vinberujoj. Nun tiaj vinberoj vendiĝas en Japanio, Hongkongo, Nord-Ameriko k.a.

## ARKEOLOGIO

● Farante esploron en julio sur Xuande-insularo de la Suda Ĉina Maro, ĉina arkeologo prof. Wang Hengjie (Ŭang Henĝje) malkovris historiajn restaĵojn de la Periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.) ĝis Qing-dinastio (1644-1911). La malkovro konigas la ekspluatadon kaj konstruadon de la insuloj en la Suda Ĉina Maro far la antaŭuloj de ĉinoj. El tio oni scias, ke ili faris ekspluatadon grandampleksan kaj kontinuan almenaŭ ekde la Periodo de Militantaj Regnoj.

● Antaŭ nelonge oni eltrovis fosilian ostaron de homo en Yesanbo, grava ŝtata vidindejo en Hebei-provinco de Ĉinio. Ĉinaj kaj alilandaj arkeologoj konstatis post ekspertizo, ke ĝi apartenas al fosilio de intelekta homo de Laishui, kiu vivis antaŭ 28 000 jaroj. La eltrovo refoje neis la vidpunkton de internaciaj antropologoj, ke ĉinaj paleoantropoj malaperis post kiam aperis pekin-homoj, kaj ke la ĉinaj intelektaj homoj senescepte migris el Afriko.

● Lastatempe oni elterigis en Huangmei-gubernio de Hubei-provinco drakon faritan el rulŝtonetoj, kiu kuŝis ĉ. 6 000 jarojn sub la tero. Ĉinaj arkeologoj avertis, ke la drako estis farita en la malfrua periodo de neolitiko (antaŭ ĉ. 10 000 — 4 000 jaroj) kaj estas la plej frue trovita en la baseno de Yangzi-rivero. Ĝi nomiĝas la Unua Drako de la baseno.

La drako estas farita el diversgrandaj kaj diverskoloraj rulŝtonetoj, kun longo de 4.46 m kaj alto de 2.26 m. Ĝi havas fiŝvoston, bestoungojn, serpentkorpon, cervokapon, malfermitan buŝon, zigzagan kolon kaj malantaŭen levitajn longajn kornojn. Kun alten levita kapo ĝi rigardas foren, kvazaŭ ĉasante ion. La versimila korpo direktiĝas de oriente okcidenten ŝajne ĉe ekflugo.

● Antaŭ nelonge en Xinjiang (Ŝinĝjang) estis trovitaj 85 francaj moneroj mulditaj en 1897. Ĝis nun en la loko estas elterigitaj 15-foje persaj arĝentaj moneroj kaj unufoje romaj oraj moneroj. La ĉi-foja trovo montras, ke tiel multaj francaj moneroj venis en Xinjiang en cirkulado. Krome, ili atestas, ke Xinjiang siatempe faris komercadon kun diversaj landoj en Eŭropo, Azio kaj Afriko.

## TURISMO

● La unuan de januaro 1988, la mondfama Tian'anmen-turo de Pekino malfermiĝis al turistoj. Ĝis nun la turon vizitis sume 4.32 milionoj da turistoj, inter kiuj estis 4.13 milionoj da ĉinoj kaj 190 000 eksterlandanoj.

## KULTURO

● Proksimume 90-jara fama ĉina verkisto kaj veterana esperantisto Bakin dediĉas sian tutan forton por plenumi la "Plenan Kolekton de Bankin".

La verko el 26 volumoj havas 9.36 milionojn da ĉinaj ideogramoj (ekskluzive de tiuj de kroniko kaj indekso). Ĉiuj volumoj estos espereble eldonitaj antaŭ 1994.

## RELIGIO

● En la pasintaj dek jaroj la centra registaro de Ĉinio kaj la registaro de la Tibeta Aŭtonoma Regiono asignis 210 milionojn da juanoj por restitui 1 400 templojn kaj palacojn en Tibeto. La monsumo por ripari Potala-palacon en Lhasa estis 60 milionoj da juanoj.

Naciminoritataj turistoj sur Tian'anmen-turo en Pekino



# Koloraj ovoj en Ĉinio

Teksto kaj fotoj de **LI QIANG**


KOLORAJ ovoj estas popola artaĵo ŝatata tra la tuta mondo, senescepte en Ĉinio. De antikve ĝis nun en Ĉinio, precipe en ĝia kamparo, daŭras la moro, ke oni disdonacas kolorigitajn kuiritajn ovojn al parencoj kaj amikoj ĉe geedziĝo aŭ naskiĝo de infano.

En Ĉinio, pentrado sur ovo havas longan historion kaj karakterizan stilon. Laŭ noto, en la meza periodo de Qing-dinastio (1644-1911 p.K.), en templaj foiroj de Pekino, vendiĝis kolorigitaj ovoj, kaj multaj el la verkintoj estis pentristoj. Tiam pentraĵoj estis relative multekostaj kaj ne havis grandan debiton, do pentristoj simple desegnis sur kuiritaj aŭ nekuiritaj ovoj kaj ilin vendis je malalta prezo. Tiaj ovoj kaj por manĝo kaj por distro tre plaĉis al la infanoj kaj rapide forvendiĝis.

Poste aperis ovoj kun pli kaj pli delikataj desegnaĵoj por la popolaj festoj. En la lastaj jaroj de Qing-dinastio, koloraj ovoj vendiĝis ĉe standoj de antikvaĵoj kaj fariĝis kolektaĵoj. Altiĝis ankaŭ la socia pozicio de la farantoj de koloraj ovoj.

Nun oni pentras nur sur ovoŝelo. Unue oni boris trueton sur ovoŝelo por elfluigi ovoblankon kaj ovoflavon; poste oni lavis per akvo la internan surfacon de la ovoŝelo kaj ĝin sekigis. Polurinte la ŝelon per smirgpapero, oni povas pentri sur ĝi.

La tradiciaj bildoj sur ovoj temis pri floroj, birdoj, sveltulinoj aŭ distriĝantaj infanoj. Nun la temo de la desegnaĵoj estas tre varia, ekz. estas ovoj kun la desegnaĵoj de 12 animaloj kiel ĉinaj jarsignoj aŭ de ŝminkitaj vizaĝoj de roloj en la pekina opero, k.a.



Zhang Weiming desegnas ovojn.

Nun en Pekino estas juna sukcesplena faranto de kolora ovo. Li nomiĝas Zhang Weiming (Ĝang Ŭejming). Li ne nur senĉese altigis sian pentran teknikon por plifortigi la artecon de siaj verkoj, sed ankaŭ emfazis la kolorojn. Li, la unua homo pentranta sur bruneta ovo, rompis la rutinon pentri nur sur blanka ovo. Li elfaris bluan farbon nedekoloriĝantan kaj ŝmiris per ĝi blankajn ovojn. Tiaj ovoŝeloj kun pentraĵoj aspektas kiel klozoneaĵo. Surbaze de tio, li sukcese elfaris kolorajn ovojn similajn al la gemaj, porcelanaj, ŝtonaj kaj lakaĵaj.

En 1991, kiel reprezentanto de ĉinaj popolaj metiartistoj, li partoprenis en la Tria Olimpika Konkurso de Talentuloj en Hongkongo kaj gajnis oran medalon. Inter la famaj specialistoj de kolora ovo venintaj el dekkelke da landoj, li okupis la unuan lokon kaj en demonstra farado kaj en vendokvanto dum la konkurso. Multaj el liaj verkoj estas kolektitaj kaj konservataj de ŝatantoj en Sudorienta Azio, Eŭropo kaj Usono. ■




Porcelan-simila ovo kun blua desegno



Klozone-similaj ovoj kun desegno de gruoj

Ovoj, sur kiuj estas pentritaj ŝminkitaj vizaĝoj de roloj en pekina opero





La akvofalo Hukou sur la Flava Rivero Foto de **REN SHIYIN**

世界语《中国报道》一九九三年第十一期（本刊代号：二——九一五）国内统一刊号：CN11　1339／G2